



**Ukrainio:
Servo malsana**

**Japanio: Eksiĝo
baziĝas sur bazo**

**Ĥolero: antikva, sed
ankoraŭ malica gasto**

Edwin de Kock

Sub Fremdaj Ĉieloĵ

“Nekutime leginda verko”

Donald Broadribb



Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj “Lastaj poemoj” sed ne malmultaj scios ke post tiuj “lastaj” li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

Paĝoj: 288; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 32

Pezo: 333 g

ISBN: 978-90-77066-33-1

Prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Ĥolero: antikva, sed ankoraŭ malica gasto 16

Antaŭ unu jaro multaj informagentejoj kun granda maltrankvilo sciigis, ke en Zimbabvo jam dum kelkaj monatoj daŭras epidemio de ĥolero. La epidemio eksplodis en aŭgusto de 2008. En decembro de 2008 estis infektitaj pli ol 10 000 homoj, el kiuj 565 mortis. Kvankam en la lando estis proklamita la esceptostato, je la komenco de februaro de 2009 la kvanto de malsanuloj atingis 60 000 kaj la nombro de mortintoj pli ol 3000.

Kumamoto

20



FOTO DE LA KOVRILO: COPYRIGHT: WATER FOR PEOPLE

politiko

SUD-OSETIO	8
Post milito, merito	
JAPANIO	8
Eksiĝo baziĝas sur bazo	
BALKANO	9
Prudenta decido	
BALKANO	9
Tri-mara mapo	

moderna vivo

AMIKECO	10
Programoj - ne prelegoj	
URBOJ	10
Renoma strato	
ALBANIO	11
Placo Skandal-erbeg	
OPINIO	11
Barb-ara decido	
HOMAJ RAJTOJ	12
Parado de toleremo	
SAMSEKSEMO	13
Gvatas Granda Frato	
FLANDRIO	13
Energiaj ciferoj	
ALBANIO	13
Decido ekzamenata	

UKRAINIO	14
Servo malsana	
FUTBALO	14
Tegmentoj te-gol-itaj	

ekonomio

FERVOJOJ	15
Trajne al Baltio	

scienco

ĤOLERO	16
Antikva, sed ankoraŭ malica gasto	

spirita vivo

OPINIO	18
Geja paro en Malavio	
LITOVIO	19
Fajra Kristnasko	

turismo

JAPANIO	20
Kumamoto	
ITALIO	22
Maŭzoleo al reĝo Gentio	

medio

DANUBO	23
Priatenti la naturprotektion	
SUDA GERMANIO	23
Fosilia trovaĵo	

libroj

Pri homoj kaj lingvoj romanece	24
Kaptu la feliĉon!	25
Du tre sukcesaj komikaj dramoj	26

noveloj

Vojaĝo unudirekta:	
Memoraĵoj de Orman Karg, astronauto	27
Ekslibriso	31

enigmoj

Kiom da ?	33
Solvo de la "bilda enigmo"	
(Monato 3/2010)	33
Proverba enigmo	34

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj.....	6
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	35

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.
Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de
Britio, Esperanto House, Station Road, Bar-
laston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio.
Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafoicejo@esperanto.fi
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
> Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa
d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
Crescent, Christchurch 8025.
Reto: gdewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
> Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
- > **Slovenaj kaj Slovakaj:**
> Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
> Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Varmo kaj frosto

En la suda hemisfero nun ja estas vintro, evidente tute normala. La temperaturoj en Sud-Afriko dum la futbalĉampionado estis agrablaj, tiel ke la piedpilkistoj ne devis multe ŝviti; la spektantoj en la stadionoj jen kaj jen iom frostiĝetis ĉe 15 celsiaj gradoj. Sed tute ne normala ŝajne estis la vintro en la norda hemisfero. En norda Ameriko kaj Eŭropo ĝi estis nekutime malvarma, se oni komparas ĝin kun antaŭaj jaroj. Pri tio oni miris iom kaj reagis preskaŭ histerie (vidu pri la temo, kion mi skribis samloke en la maja numero). Jes, ankaŭ mi miris, ĉar ja dum multaj jaroj ni havis en Eŭropo tre mildajn vintrojn, kion oni klarigis al ni tiel: pro la varmiĝo de la tero sekve de la homfarita klimatsanĝo la temperaturoj kreskis dum la tuta jaro, do ankaŭ dum vintro. Tial ni havis preskaŭ nenian neĝon kaj fros-

ton. Sed nun subite revenis severa vintro, kian mi konis el mia junaĝo. Kio do okazis? Ĉu la klimatologoj eraris aŭ misinformis nin?

Kaj nun mi legis, ke pri la severa vintro tamen kulpas la klimatsanĝo! Mi unue frotis la okulojn, ĉar mi pensis, ke mi mislegis. Ĉu ne estas kurioza sekvo de varmiĝo ĝenerala, ke la vintroj en nia hemisfero fariĝas pli frostaj ol antaŭe? Sed la klarigo de sciencisto James Overland [ĝejms óúverlend] de la usona veteroficejo NOAA estas relative konvinka: Ĉar en la arкта regiono pli kaj pli degelas la glacio pro la varmiĝo dum somero, la marakvo prenas pli da varmo, tiel ke Arkto dum aŭtuno kaj vintro estas je unu celsia grado pli varma ol antaŭe. Tio ŝanĝas la atmosferan premon: stabila malvarma alt-premo en la nordo ŝovelas sekan arktan malvarman aeron en mezajn latitudojn. Tieajn landojn antaŭe

provizis atlantikaj ventoj per malseketa aero, kio rezultigis mildajn vintrojn. Nun Overland, kiu dum jam multaj jaroj observas la klimaton de Arkto, prognozas por norda Ameriko, Eŭropo kaj Azio malvarmajn vintrojn. „Frostaj kaj neĝoriĉaj vintroj estos probable pli regulaj ol esceptaj“, li diras.

Se la klimatologo pravas, pri kio mi ne multe dubas, tio do signifas, ke ni denove bezonos pli multan hejtenergion. Ĉu ni ne estis tre kontentaj, ke pro la mildaj vintroj ni ŝparis nafton kaj gason? Kaj nun tiu stranga inverso! Eble la klimatsanĝo regalos nin ankoraŭ ofte per surprizoj neatenditaj. Ni vidu, kia estos la somero... Agrablajn feriadon!

Sincere via

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaastr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redakto, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzonj oni ne sendu al la redaktoro proprajnciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario.
Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu

viajn kontribuojn al la eldonejo:

Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

**Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?**

**Donaco por merita ano
de Esperanto-klubo?**

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio
aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Tri regionoj: kelkaj precizigoj (2)

Kiam mi legis en la reago de Gustave Ligot (MONATO 2010/7, p. 6) la frazon „Mi ne konas la fontojn de Ivo Durwael”, mi supozis dubon kaj atendis kritikon. Tamen en la posta alineo mi legis nur aprobojn.

Rilate la montransigojn mi proponas konsulti la studojn de Juul Hannes, liberala emerita profesoro pri ekonomia historio ĉe la universitato de Gento kaj Bruselo. Temas pri detalaj esplorado kaj kalkulado pri impostoj en la belga historio surbaze de dokumentoj. Lia konkludo: neniam okazis montransigoj de Valonio al Flandrio. Ekzemple en la periodo 1831-1912 flandro mezume pagis 5,3 % pli da rektaj impostoj ol valono.

Se oni konas tiujn ciferojn, oni povas kompreni la acidan sintenon de la flandroj, kiuj sentas sin melkitaj. Supozeble sinjoro Ligot povus trovi aliajn „kompletigojn” al miaj argumentoj, kaj mi ne dubas, ke post persona interdiskuto ni disirus kiel amikoj, kiel kutime okazas inter flandroj kaj valonoj.

Tamen alarma estas la fakto, ke la politikaj diskutoj inter la du komunumoj tiel polariĝis, ke la federacia registaro ne povis preni necesajn decidojn por alfronti la ekonomiajn problemojn. Post la greka katastrofo la eŭropaj instancoj anoncas, ke ĉiuj landoj de Eŭropa Unio devos efektiviĝi ŝparojn. Ekonomikistoj en Belgio avertas, ke la politikaj partioj ŝajne ne konscias pri tiu ĉi necesajo. La flandraj partioj almenaŭ nun ellaboris planojn, kie oni devos efektiviĝi ŝparojn, dum tiu temo eĉ ne aperis en la balotaj programoj de franclingvaj partioj.

Ivo DURWAELE, Belgio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en Monato. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de Monato.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Naŭzita de koruptado

Stefan MAUL

Ne estas nova fenomeno, ke elektantoj per parlamentaj balotoj punas politikistojn pro korupteco. Tio okazas en multaj landoj, laste ekzemple en Britio, kie la laborista partio draste perdis, ĉar ties deputitoj aparte senhonte ekspluatis ŝtatajn subvenciojn por privataj celoj. Sed en landoj, kie demokratio ankoraŭ ne komplete enradikiĝis, korupteco ne nepre kondukas al tia puno. Bulgario ekzemple devis akcepti jam punpagon de Eŭropa Unio (EU), ĉar la registaro ne sufiĉe energie batalis kontraŭ koruptado. En Grekio nelaste pro koruptado la ŝtato finance preskaŭ kolapsis; certe ĝi estas demokratia lando, sed koruptecon ĝi heredis el la epoko de la militista diktaturo.

Parto de la sistemo

Nun tamen en pluraj postkomunistaj landoj okazis, ke regantaj partioj perdis sian potencon, ĉar elektantoj punis ilian koruptecon aŭ ilian nebalon kontraŭ ĝi; evidente tie koruptado estas ekstreme disvastigita, kvazaŭ estas parto de la politika sistemo, kiel dum komunismo. Ofte estas precipe maldekstraj partioj, do ekskomunistaj, kiuj regis per tiu sistemo. En Ĉeĥio, Hungario kaj Slovakio elektantoj, naŭzitaj pri tio, preferis konservativulojn kaj liberalulojn, kiuj promesis, pli-malpli konvinke, batali kontraŭ koruptado.

Ni prenu la ekzemplon Slovakio. Ĉu povas esti, ke tie unu kilometro de aŭtovojo kostas kvinoblan sumon kompare al Kroatio? La slovaka opozicio antaŭ la balotoj riproĉis tion al la socialdemokrata registaro kaj ankaŭ indikis la kaŭzon: gigantan koruptadon. Post sia venko nun la burĝa kvarpartia registaro havas okazon, agadi

pli bone. Batalo kontraŭ koruptado estas unu el iliaj plej gravaj taskoj.

Mizeraj salajroj

Tamen la konduto de la elektantoj iom mirigas, ĉar samtempe kun la promeso batali kontraŭ koruptado, la novaj registaroj devis jam antaŭe anonci ankaŭ, ke la ŝtatoj devos ŝpari. Tio estas sekvo ankaŭ de koruptado, ĉar ĝi ja ekspluatas la ŝtatojn. Tamen civitanoj preferas ŝtatan ŝparadon, probable ĉar ili timas la „grekan vojon”. Sed tio ne estas memkomprenebla, ĉar la ŝparprogramoj ja trafos precipe la plej multajn ordinarajn homojn. Kion oni volas preni de pensiulo, kiu meze ricevas nur 175 eŭrojn kiel en Rumanio? Kaj kion preni de ŝtatoficisto, kiu perĝajnas nur ĉirkaŭ 300 eŭrojn kaj tial bezonas duan kaj trian laboron por vivteni sin? Oni do povas kompreni, se

estiĝas protestoj. Oni devas atendi socialajn perturbojn en tiuj landoj.

Tamen multaj homoj scias: la planataj ŝparprogramoj estas neeviteblaj. Burokrataro estas tro multnombra, patronado kaj klientismo floras, ekskomunistoj nutras sin reciproke per negocoj kaj subvencioj, partiojn uzurpas lobiistoj (aŭ ili mem eĉ fondas partiojn). Koruptado ne malkreskas interalie pro tro malaltaj salajroj en publikaj sektoroj. Ĉio ĉi daŭre malhelpas konstruadon de demokratio kaj merkata ekonomio. Ĝi malfaciligas ekonomian agadon kaj fortimigas investantojn, kvankam tiujn ĉi interesas la regiono pro ties kvalifikitaj laborfortoj.

Heredaĵo komunisma

La kerno de la problemaro estas la manko de konscio pri maljusteco. La mizeran heredaĵon de komunismo oni ne povas simple ekstermi dum 20 jaroj. Realigo de juroŝtato tial estas unu el la plej urĝaj taskoj de la registaroj tie. Ankoraŭ rezidas en justicoficoj tro multaj „iamaj kamaradoj”. Procezoj daŭras tro longe, en multaj okazoj oni tute ne komencas ilin – terura miscirkonstanco. En pluraj landoj oni ankoraŭ neniam akuzis gravulon, spite al evidenta suspekto.

Sed eble tio baldaŭ ŝanĝiĝos. Juna generacio komencis anstataŭi la politikan klason de la transira periodo. Demando estas tamen, kiom stabila estos tia evoluo. Sed ni konsciu pri la historia dimensio de tiu ĉi demokratiiga procezo. Ni do havu paciencon. Decidaj ŝanĝoj unue devas okazi en la konscio de la homoj, ĝis ili realiĝos en politikaj diskutoj, en ĉiutagaj publika vivo kaj en ekonomio. Sed ŝajnas, ke tia konsciigo nun estas sur bona vojo. Ni do esperu, en la intereso de la homoj, de ni ĉiuj. ■



Tamen civitanoj preferas ŝtatan ŝparadon...

Post milito, merito

Aperis sur kelkaj mapoj la nomoj de du novaj ŝtatoj: Sud-Osetio kaj Abĥazio. Plejparte, tamen, oni ankoraŭ parolas pri Kartvelio.

En 2008 okazis konflikto en Sud-Osetio, en kiu precipe Rusio partoprenis. Du jarojn poste parolis la prezidanto de Sud-Osetio, Eduard Kokoĵi, pri sia lando. En intervjuo kun la rusa patriota gazeto *Zavtra* (Morgaŭ) li diris, ke la fakto, ke kelkaj ŝtatoj, inkluzive Rusion, nun agnoskas Sud-Osetion, realigis almenaŭ parte lian revon pri la osetia gento.

Abiturientoj

„Antaŭ la agnosko de Rusio,” daŭrigis la prezidanto, „la popolo vivis sub daŭra timo pri agreso de la flanko de Kartvelio. Nun, tamen, estas rekonstruata la lando. Kunlaboras rusaj specialistoj por krei lernejojn kaj malsanulejojn, dum abiturientoj el Sud-Osetio studas ĉe prestiĝaj rusaj altlernejoj.”

Helpas la rekonstruadon pli stabila situacio en la regiono. Ĉesis militoj en Ĉeĉenio kaj konfliktoj en Sud-Osetio kaj Abĥazio. Tio ebligas al prezidanto Kokoĵi plenumi sian politikon pri proksimiĝo al aliaj gentoj. Tamen la rilatoj kun Rusio kolizias kun la ŝtataj interesoj de Kartvelio, kio eble kaŭzos problemojn en la estonteco.

Dmitriy VLASSOV/pg

Eksiĝo baziĝas sur bazo



Ŝajnas, ke Kan Naoto estas originala kaj unika politikisto, do multaj bonvenigas novan ĉefministriĝon.

Komence de junio la japana ĉefministro Hatojama Jukio eksiĝis post malpli ol unu jaro en sia ofico. Kulpis parte lia nehonesteco rilate privatajn financajn aferojn, parte problemoj pri militbazo.

Fariĝinte ĉefministro en septembro 2009, li unue tre popularis. Lian venkon en la deputitaj elektoj en aŭgusto bonvenigis la popolo, kiu suferis pro longdaŭra burokrata politiko de la Liberala Demokratia Partio.

En novembro pasintjare evidentis, ke li ne raportis ĝuste pri siaj posedaĵoj al la ministrejo pri internaj aferoj. Li pretekstis, ke li naskiĝis en riĉa familio kaj ne atentis tiajn aferojn. Tamen jam en oktobro partia sekretario, Ozaŭa Iĉiroo, estis arestita pro kaŝado de mono. Klariĝis,

ke la du plej gravaj homoj estas nepuraj pri mono.

Militbazo

Alia problemoj koncernis la translokadon de usona militbazo en Okinaŭa. En aprilo Hatojama, dum 10-minuta renkontiĝo kun la usona prezidanto Obama, promesis en du monatoj transloki bazon en la centro de la homplena urbo Ginoŭan, kiu ĉiutage minacis la vivon de la loĝantoj.

Tamen la ĉefministro ŝanĝis siajn ideojn, tiel ke la perfiditaj okinaŭa-anoj eksplodis kun kolerego kaj decidis batali kontraŭ Hatojama kaj lia nova plano. Tiamaniere la ĉefministro, komence tre populara, eksiĝis malpopulare post nur ok monatoj.

Aidoso-pacientoj

Du tagojn post la eksiĝo Kan Naoto estis elektita la 94a japana ĉefministro. La antaŭaj kvin ĉefministroj devenis de politikista familio, sed Kan ne. Naskiĝinte en ordinara familio, li okupiĝis en la civitana movado. En 1980 li elektiĝis deputito. Kiam ministro de bonfarto en 1996, li pardonpetis al aidoso-pacientoj pro la fuŝaĵoj de la registaro.

Ŝajnas, ke li estas originala kaj unika politikisto, do multaj bonvenigas lian ĉefministriĝon. Tamen atendas Kan-on diversaj problemoj, inkluzive de la translokado de la usona bazo kaj de la financa krizo. Kutime popoloj emas subteni novan kabineton, sed baldaŭ ili sentas sin malesperaj. Ankoraŭ vidiĝos, ĉu tio okazos al la nuna kabineto de Kan.

HORI Jasuo

Prudenta decido

Komence de junio solviĝis definitive la 20-jara konflikto pri landlimoj inter Slovenio kaj Kroatio. La registaroj de la du landoj, ne povante interkonsenti, transdonis la problemon al neŭtrala arbitracia juĝistaro. Ties decidon akceptis ambaŭ registaroj, poste ambaŭ parlamentoj. Tamen la slovena maldekstra opozicio postulis referendumon.

La referendumo okazis post dumonata intensa lobiado. La registaro invitis la popolon akcepti la proponon. Sed la plej forta opozicia partio, Slovena Demokratia Partio, gvidata de Janez Janša, lobiis kontraŭ la interkonsento. Neniu kuraĝis prognozi la rezulton, ĉar esploroj montris, ke proksimume duono de la popolo estas por kaj duono kontraŭ. Tion konfirmis la rezulto. Partoprenis la referendumon 42 % de la voĉdonrajtigitoj: 51,5 % subtenis la proponon, 48,5 % ne.

Blokado

La decido ne nur solvis 20-jaran konflikton, kiu daŭre venenis la rilaton inter la du landoj, sed ankaŭ ebligis al Slovenio rezigni pri blokado kontraŭ kroataj traktadoj kun EU. Sekve Kroatio verŝajne iĝos nova membro de EU post tri aŭ kvar jaroj.

Tio samtempe kondukos iom post iom al la integriĝo de la iama teritorio de Jugoslavio en EU kaj pro tio al longtempa pacigo de la balkana spaco. La komentoj de pluraj eŭropaj politikistoj estis tre pozitivaj. La prezidanto de la Eŭropa Parlamento, Jerzy Buzek, parolis pri prudenta decido kaj la prezidanto de la Eŭropa Konsilio, Herman Van Rompuy, gratulis la slovenan kancelieron Borut Pahor.

Zlatko TIŠLIJAR



Politikistoj en Eŭropa Unio gratulis la slovenan kancelieron Borut Pahor pro la landlima decido.

Tri-mara mapo



„Bulgario ĉe tri maroj”
(Nigra, Egea kaj Adriatika):
jen la eventuale ofenda devizo
sur t-ĉemizo.

Aperis sur T-ĉemizoj mapo pri la tiel nomata Granda Bulgario. Surprize estas, ke oni permesas la publikigon de mapo, kiu memorigas pri la tempo antaŭ mil jaroj, kiam bulgaroj regis preskaŭ la tutan Balkanon. En Albanio ankoraŭ troveblas kelkaj bulgardevenaj loknomoj.

Certe ankoraŭ ekzistas en Bulgario nostalgiuloj pri la pasintaj imperiaj tempoj. Tamen mapo tia – montranta Bulgarion inter la tri maroj Nigra, Egea kaj Adriatika – povus ofendi najbarajn landojn. Dubindas, ekzemple, ĉu en Albanio videblus simila mapo pri Etna Albanio, kiun najbaroj konsiderus Granda Albanio. Aliflanke pluraj albanoj akiris bulgaran civitanecon por pli facile moviĝi tra Eŭropo.

Bardhyl SELIMI

AMIKECO

Programoj - ne prelegoj

Pro kunlaboro inter redakcianoj de la albana televido-programo „Perditaj homoj” kaj de la rusa „Ĵdi menja” („Atendu min”), revidas sin familianoj kaj iamaj amikoj.

Ruso, Gavrila Bakiŝev, el la urbo Gori (Kartvelio), servis ĉe la rusa blanka gvardio kaj post 1924 ĉe la reĝa gvardio en Albanio. Lia nepino Alla Mihajlovna en Moskvo serĉis la avon pere de la Ruĝa Kruco kaj laste per la televida programo. Samon faris lia albana filo Jovan, ĉirkaŭ 72-jara, en Tirano. Fine, la nepo albana Kliti, filo de Jovan, studanta en Rusio, sin prezentis antaŭ Ala,

feliĉigante ankaŭ spektantojn en ambaŭ landoj.

Amikino

Simile, rusino Saida Romanova el Harkovo (Ukrainio), konatiĝis antaŭ 1960 kun albana studento Muhamet Stafa. Post la malamikiĝo inter la du landoj, ŝi ne plu vidis lin. Muhamet, nun 68-jara, sukcesis, danke al ambaŭ redakcioj, vojaĝi al Moskvo kaj renkonti sian iaman amikinin. Argumenteble elsendoj tiaj fortigas amikajn sentojn inter popoloj pli ol prelegoj politikaj.

Bardhyl SELIMI



LINKER | PATRICK

URBOJ

Renoma strato

Ĉu nomo de strato estas ligita kun politiko? Dependas kie. Verŝajne, neordinara demando en ordinara mondo. Sed – ĉu Serbio apartenas al la ordinara mondo? Hm!

La strato, en kiu mi loĝas, fariĝis urba strato antaŭ jarcento kaj duono. Ĝi estas ordinara strato en la centro de Beogrado. Dum sia 140-jara historio ĝi ses fojojn ŝanĝis sian nomon. Similan sorton travivis multaj stratoj en Beogrado.

La unua nomo de mia strato estis Du Blankaj Kolomboj (1872-1896). Poste ĝi nomiĝis Svetogorska (laŭ la loko en Greklando, kie situas serba monaĥejo). Tiun nomon la strato portis ĝis 1922, de kiam ĝi nomiĝis

Bitoljska (laŭ la nuntempa makedona urbo, kie en bataloj kun turkoj pereis multaj serbaj soldatoj).

Post 13 jaroj oni donis al la strato la nomon Ĵorĝa Klemenĉo, tio estas la fama franca politikisto Georges Clemenceau. Kiam Germanio okupis Serbion, la strato portis inter 1943 kaj 1945 denove la nomon Svetogorska. Poste la nova komunista registaro ŝanĝis la nomon al tiu de juna komunista heroo Ivo Lola Ribar. La nomo restis ĝis 1997, ekde kiam la strato estas konata denove kiel Svetogorska.

Tiel stratnomo spegulas politikon.

Dimitrije JANIĆ



DIMITRIJE JANIĆ

En sia 140-jara historio la nomo de tiu ĉi serba strato plurfoje ŝanĝiĝis.

Placo Skandal-erbeg



Placo Skanderbeg: skandala estas la daŭra neglekto de la ĉefa placo en Tirano.

La ĉefa placo, nomata placo Skanderbeg, en la albana ĉefurbo Tirano, estis rekonstruita en 1986. Ekde tiam la placo pro neglekto kadukiĝas. Ekzemple, ĉe la fasado de la Palaco de Kulturo kaj eĉ en ĝi, la marmoro detruita dum protestoj en 1991, kiam oni faligis la statuon de la diktatoro Enver Hoxha [hodja], ankoraŭ ne estas riparita.

Antaŭ tri jaroj la urbodomo en Tirano ricevis tri milionojn da usonaj dolaroj el Kuvajto por restaŭri la placon. La laboro ankoraŭ ne komenciĝis. Pro tio la landa registaro forte kritikis la lokan socialistan urbestraron, kiu siavice akuzis la registaron, ke tiu ne finance helpis okaze de konstruado de ringpasejo ĉirkaŭ la placo.

Cetere daŭras kvereloj pri nova plano por la centro de Tirano. La urbodomo antaŭvidas altajn, ĉielskrapantajn konstruaĵojn, dum la civitanoj ankoraŭ suferas pro la malbona stato de sia ĉefa placo kaj pro manko de spaco kaj por trafiko kaj por ripozo.

Bardhyl SELIMI

OPINIO

Barb-ara decido

La urbo Isesaki en la japana gubernio Gunma malpermesis al siaj oficistoj porti barbon. La urbo argumentas: „La oficistoj laboras ne private sed oficiale kiel urbaj dungitoj. Troviĝas urbanoj, kiuj sentas malagrablon pro barbuloj. La urba oficejo estas servilo por urbanoj.”

Tamen la komitatestro pri homaj rajtoj en la gubernia advokataro opiniis: „Bone flegata barbo estas socie agnoskita. Totale malpermesi barbon povas atenci homan rajton.” La malpermeso estas eble la unua tia en Japanio.

Estraranoj

Mi do esploris, kiom da homoj portas barbon. Mi iris al Tokio por ĉeesti estraran kunsidon de la Japana Esperanto-Instituto. Inter 15 viraj estraranoj unu portis lipharojn. Revenante, mi serĉis barbulojn en trajnoj kaj stacidomoj.

En unu trajno mi trovis el 40 homoj unu kun barbo; en alia vagono el 15 homoj nenian. Ĉe stacidoma kajo mi rimarkis unu homon kun lipharoj. Entute el 100 homoj nur tri portis tre modestajn lipharojn aŭ barbon. Vere en Japanio estas tre malmultaj barbuloj.



NICCOLO GARANTI

Razado

Antaŭe ankaŭ mi portis barbon, ĉar ĝenis min ĉiumatena razado. Tiutempe mi ofte spertis, ke, kiam mi parolas kun nekonatoj, aperas timeto sur iliaj vizaĝoj. Tio ne agrablis al mi. Krome mi trovis, ke flegi barbon pli ĝenas ol razado. Do mi rezignis pri la barbo. Tamen la decido de la urbo Isesaki estas troa. Se la urbo respektas plendojn pri barboj, ĝi cedu al aliaj plendoj, ekzemple pri kalvaj kapoj kaj perukoj. Barbo estas iusence simbolo de libereco, do nun la urbo certgrade subpremas demokration.

HORI JASUO



1



2



3

HOMAJ RAJTOJ

Parado de toleremo

Unafoje paradis en Litovio samseksemuloj. Jam de longe ne kuraĝis la instancoj permesi eventon tian, timante malaprobbon kaj kontraŭstaron, sed fine okazis en majo la aranĝo „Por la egaleco”.

Partoprenis la paradon en la ĉefurbo Vilnius ĉirkaŭ 300 homoj. Ĝin salutis la sveda ministrino pri EU-aferoj, Birgitta Ohlson, kaj membroj de la eŭropa kaj litova parlamentoj. Ili substrekiis la gravecon de la evento rilate defendadon de homaj rajtoj en Litovio.

Kolbasetoj

Anocis afiŝoj: „Kial mia amo kaŭzas vian malamon?”, „Por familia diverseco” kaj „Amo ne konas seksojn”. Gardis la paradantojn ĉirkaŭ 800 policistoj kontraŭ tiuj, kiuj krie esprimis sian koletron kaj ĵetis botelojn, kolbasetojn, kaj eĉ fumo-bombon. Du parlamentanoj saltis super barilo kaj atakis paradantojn. La polico arestis entute 19 agresintojn.

Kelkdeko da homoj esprimis sian malkontenton ĉe la katedralo de Vilnius, kie ili preĝis „por savi Litovion”. Alia petis la demision de la urbestro de Vilnius. Leviĝas do la demando, ĝis kiu grado Litovio fakte toleremas.

LAST

1. La unua parado de samseksemuloj okazis en majo en la litova ĉefurbo Vilnius.
2. Oponantoj preĝis ĉe la katedralo en Vilnius por „savi” Litovion.
3. Centoj da policistoj protektis la samseksemulojn.

Gvatas Granda Frato

Kiam partoprenanto en la albana versio de la televida programo „Granda Frato” malkaŝis sian samseksemon, montriĝis la tradicia publika opinio albana. La sekvan tagon en lia romkatolika naskiĝurbo Lezhë [leje], manifestaciis 400 gejunuloj kontraŭ la samlokano, kiu „detruis” la bonan impreson pri sia komunumo.

Aliflanke defendis la sinjoron ne nur homrajtaj neregistraj organizaĵoj, sed ankaŭ la ambasadoroj de Usono, Germanio kaj Nederlando. Lastjare la albana registaro, kadre de la kondiĉoj por eniri Eŭropan Union, aprobis leĝon por protekti samseksemulojn.

Bardhyl SELIMI

ALBANIO

Decido ekzamenata

Magistriĝontoj ĉe albanaj universitatoj devos trapasi ekzamenon pri la angla lingvo, decidis lastatempe la albana registaro. La angla, laŭ la albana ĉefministro Sali Berisha – cetere honora prezidanto de albanaj anglemuloj –, ludas „ĉiam pli gravan rolon en internaciaj aferoj”.

Forte kontraŭis la decidon universitataj instruistoj kaj aliaj. La decidon ili taksis absurda, atentigante, ke pli ol 95 % de la magistriĝontoj sin okupas per albanlingvaj kaj enlandaj aferoj. Cetere ili ofte jam scipovas fremdajn lingvojn, investinte tempon kaj monon. Unu el la kritikantoj eĉ aldonis, ke la ĉefministro mem trapasu la ekzamenon, ĉar tiu ne flue parolas la anglan.

Bardhyl SELIMI

FLANDRIO

Energiaj ciferoj

Flandrio konsumas jare la ekvivalenton de sep tunoj da nafto por ĉiu loĝanto. En Nederlando tio estas nur kvin tunoj, en Germanio nur kvar kaj en Francio iom pli. Tiuj ciferoj ne donas bildon pri la konsumado de individuoj, sed enkalkulas industriojn, kiuj koncentriĝas en Flandrio kaj do kreskigas tiun ciferon.

Tamen la flandra medioadministrado substrekas, ke Flandrio havas multe da malbone izolitaj domoj. Kiu foje rigardas noktajn bildojn en *Google earth* krome malkovros la lumomakulon de Belgio pro senkompara iluminado de aŭtovojoj. Oni taksas, ke jam la lumigo de publikaj vojoj konsumas 480 miliardojn da vathoroj.

Najbaroj

Enerĝikonsumado pli forte kreskis en Flandrio ol ĉe ĝiaj najbaroj. Por duobligi sian produktadon inter 1990 kaj 2007 ĝi konsumis 43 % pli da energio. En la sama periodo Nederlando bezonis pliajn 15 % kaj Britio nur 2,7 %. Germanio konsumis eĉ 3 % malpli. La germana industria federacia lando Nordrejn-Vestfalio, komparebla kun Flandrio, bezonis nur 17,8 % pli da energio.

La eŭropan rekordon tenas Luksemburgo, kiu konsumas 9,1 tunojn por ĉiu loĝanto. Sed tiu cifero donas falsan bildon kaj nur parte rilatas al la propra konsumado. En Luksemburgo, naftoproduktoj kostas konsiderinde malpli ol en najbaraj landoj pro malpli altaj impostoj. Rezulte, ĉelimaj loĝantoj de Belgio, Francio kaj Germanio kaj trafikantoj, kiuj traveturas la landon, plenigas la benzinujojn de siaj veturiloj en Luksemburgo.

Ivo DURWAELE



UKRAINIO

Servo malsana

TOASTFORBENKIE

Laŭ la konstitucio de Ukrainio, ĉiu civitano rajtas ricevi senpagan medicinan helpon en tiel nomataj poliklinikoj aŭ hospitaloj. Tamen evidentiĝas, ke tiu „senpaga” helpo tre multe kostas, ekzemple se okazas operacio.

Nun, pro ukazo de la ministro pri edukado, ĉiu instruisto, ĉu en baza, ĉu en supera lernejo, ĉiujare submetiĝu al kontrolado de sia sanstato. De iu vidpunkto tio pozitivus. De alia, tamen, tio kondukos nur al riĉigo de kuracistoj.

Libervole

Viziti kuraciston kostas tempon (pro longaj vicoj) kaj monon. Cetere, antaŭ ol akcepti novan pacienton, kuracisto devas kontroli, ĉu tiu pagos „libervole” al bonfara fonduso de la koncerna polikliniko. Ekzistas alia, kontraŭleĝa, vojo. Konato de la kuracisto akceptas monsumon kune kun la sanlibreto de la instruisto. Post iom da tempo revenas la libreto kun laŭe stampitaj paĝoj, kvazaŭ la paciento estus kuraciste kontrolita. Tiel solviĝas la problemoj – korupte.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

FUTBALO

Tegmentoj te-gol-itaj



BRONSKI BEAT

En Vieno oni malfermis la unuajn surtegmentajn futbal-ludejojn en Eŭropo. Disponblas en la urba distrikto Hernals kvar tieaj ludejoj sur sinteza herbo. Similaj tegmento-ludejoj ekzistas ĝis nun nur en Miami kaj Tokio, laŭ informoj de la aŭstra gazetara agentejo APA.

Sur la sama tegmento, kie vintre jam de 100 jaroj staras glitkurejo sur artefarita glacio, nun somere oni ludos futbalon. La ludejoj havas areon de 722 m² kaj estas ĉirkaŭitaj de altaj kaptoretoj. La futbalistoj povas uzi vestejojn, duŝejon kaj piedpilko-ludonejon. Krome estas starigita futbal-lernejo por trejni gejunulojn.

Evgeni GEORGIEV

Artikolojn pri la vivo en via regiono sendu al moderna_vivo@monato.net

FERVOJOJ

Trajne al Baltio

En majo 2010 en la eta litova-pola limpunkto Mockava ekis internacia projekto nomata „*Rail Baltica*”, kies celo estas per eŭrope dimensia fervojo kunligi la baltan regionon – Litovion, Latvion, Estonion – kun okcidenta Eŭropo. Tiu ideo jam delonge flirtis en la kapoj de la regionaj aŭtoritatoj kaj instancoj de Eŭropa Unio, sed fina decido venis nur nun.



Litovoj ekigis la projekton Rail Baltica en la litova-pola limurbo Mockava. La kunordiganto de la projekto Pavel Telička diras, ke en 2014 eŭropaj trajnoj jam devus atingi Kaunas.

Por trajne kunligi Baltion kun la cetero de Eŭropo oni finfine decidis ne konstrui novan fervojon, sed rekonstrui la malnovan, konstruitan dum la sovetia periodo. Pavel Telička, la kunordiganto de la projekto, klarigis, ke la unua etapo de la projekto devas finiĝi en la jaro 2014. La nova eŭropa fervojlinio iros kune kun la sovetia larĝtraka. La unua etapo kunligos la limurbeton Mockava kun Kaunas, la dua urbo de Litovio. Nur en la lokoj, kie tio montriĝos neebla, estos konstruata nova parto. Tiel la kostoj de la projekto falis de la antaŭe

planitaj 580 milionoj da eŭroj ĝis 232 milionoj. 27 % de la necesaj monrimedoj liveras Eŭropa Unio.

La projekton kune realigos poloj kaj estonoj. Estonte la fervojo, parto de la tuteŭropa transport-reto TEN-T, kunligos la tri baltajn landojn kaj kondukos ĝis Helsinko, la ĉefurbo de Finnlando. *Rail Baltica* unue kontribuos al la ekonomia kresko de la regiono kaj nur poste utilos al pasaĝera trafiko. Komence la rapido de la ŝarĝtrajnoj estos nur ĉirkaŭ 90 km/h.



Pavel Telička, diplomato kaj eŭropokrato

Pavel Telička naskiĝis en 1965 en Vaŝingtono en la familio de ĉeĥoslovaka diplomato. Li laboris dum pluraj jaroj en la ĉeĥoslovaka, poste ĉeĥa ministrejo pri eksterlandaj aferoj kaj estis la ĉefa intertraktanto dum la proceduro de la aliĝo de Ĉeĥio al Eŭropa Unio. En 2004 li dum mallonga tempo estis eŭropa komisionano. Poste li aktivis kiel konsilisto pri eŭropaj aferoj.

Ĉar la komplika projekto *Rail Baltica* nur pene progresis, Telička en 2007 estis nomumita kiel ĝia kunordiganto.

RR

Antikva, sed ankoraŭ malica gasto

Antaŭ unu jaro multaj informagentejoj kun granda maltrankvilo sciigis, ke en Zimbabvo jam dum kelkaj monatoj daŭras epidemio de ĥolero. La epidemio eksplodis en aŭgusto de 2008. En decembro de 2008 estis infektitaj pli ol 10 000 homoj, el kiuj 565 mortis. Kvankam en la lando estis proklamita la esceptostato, je la komenco de februaro de 2009 la kvanto de malsanuloj atingis 60 000 kaj la nombro de mortintoj pli ol 3000. Ekde aŭgusto de 2008 ĝis la komenco de julio de 2009 la komuna nombro de malsanuloj egalas preskaŭ 100 000, el kiu mortis pli ol 4000. Kaj tiuj estas nur oficialaj indikoj. Aperis la malsanminaco por pli ol unu miliono da loĝantoj.

Kial nuntempe ekestis tia tragedia situacio, kiam estas bone konataj la vojoj de kontaĝo per ĥolero, estas ellaboritaj fidindaj preventaj rimedoj kaj ekzistas tre efikaj medikamentoj por kuracado? La kaŭzoj estas jam bone konataj: pro konstanta manko de bonkvalita, pura akvo, la loĝantaro estis devigita trinki akvon el malpurigitaj akvejoj, eĉ pluvakvon. Forestis kemiaĵoj por seninfektigo. Kvalita medicina helpo estis neatingebla por la plimulto de la malsanuloj. En malsanulejoj ofte forestis efikaj kuraciloj, kaj multaj medicinistoj forlasis la laboron pro la malbona ekonomia situacio. Necesis urĝa helpo, kaj ĝi estis efektivigita. El Monda Organizaĵo pri Sano, la organizaĵoj Kuracistoj sen Limoj, la internacia Ruĝa Kruco kaj aliaj alvenis multnombraj medicinistoj kun necesaj medikamentoj, seninfektigiloj, kontraŭĥolera vakcino ktp. Pro tiu helpo fine de julio 2009, laŭ informo de la mi-

nistro pri sanprotektado de Zimbabvo, la ĥolera epidemio preskaŭ finiĝis. Sed la situacio ankoraŭ estas maltrankviliga, ĉar restas problemoj pri bonkvalita akvoprovizado. Same ekzistas la minaco ke aperos ĥoleraj epidemioj en apudaj afrikaj landoj.

Pasinteco de ĥolero

Ni ekzamenu iujn historiajn faktojn kaj la nuntempajn situacion pri ĥolero en la mondo. Ĥolero estas tre antikva malsano. Kuracistoj el antikvaj Egiptio, Hindio, Grekio kaj aliaj atentis ĝiajn gravajn diareojn kun alta morteco, plej oftaj en someraj monatoj. Precipe detale priskribis la simptomojn de ĥolero kuracistoj el Hindio, kio estas komprenebla, ĉar la hinda duonkontinento estis konstanta

ardejo de ĥolero dum kelkaj jarmiloj. Plej ofte suferis la loĝantaro laŭborde de la riveroj Gango kaj Bramaputro, kies akvon oni kutime uzis por trinkaĵo kaj aliaj ĉiutagaj bezonoj. El Hindio ĥolero penetris aliajn landojn de Azio, Afrikon, la apudmediteraneajn landojn kaj aliajn. En Eŭropo ĥolero precipe disvastiĝis ekde la komenco de la 19a jarcento. Al tio kontribuis plirapidigintaj transportiloj kaj koloniaj militoj. De 1817 ĝis 1926 sciencistoj elkalkulis 6 pandemi-
ojn de ĥolero, kiuj ofte okazigis amasajn dezertigojn. Ekzemple, dum la unua pandemio (1817-1823) ĥolero el Hindio disvastiĝis en Birmo, Ĉinio, Filipinoj, landoj de Afriko, poste atingis Japanion kaj eniris Rusion. Dum la dua pandemio (1826-1837), same komence el Hindio,



La situacio ankoraŭ estas maltrankviliga, ĉar restas problemoj pri bonkvalita akvoprovizado.

**En 1883 Robert Koch evidentigis,
ke la kaŭzo de ĥolero estas la bakterio *Vibrio cholerae*.
La malkovro de Koch kontribuis
al la klarigo de la vojoj de kontaĝo per la infekto.
La ĉefa rolo en tio apartenas al
infektita akvo.**

ĥolero disvastiĝis en landoj de Eŭropo (Anglio, Francio, Germanio kaj aliaj), en la eŭropa parto de Rusio, kaj eĉ eniĝis en Aŭstralio kaj iujn landojn de Ameriko. Same vaste disvastiĝis ĥolero dum aliaj pandemioj. Dum ĉiuj pandemioj ĥolero eniris Rusion. Kaj ĉiuforte en la mondo estis milionoj da malsanuloj kaj multaj miloj da mortintoj.

rompiĝas la funkcio de la kardiovaskula sistemo, renoj ktp. Sen urĝa medicina helpo la malsanulo pereas.

Nuntempe ekzistas tre efika kuracado de ĥolero. Por tio oni uzas la specialajn salajn solvaĵojn (solvaĵoj de MOS), entenantajn en necesaj koncentritecoj jonojn de natrio, kalio, kloro kaj aliaj, kiujn oni enigis en la organismon

Tiuj vibrioj havas pli grandajn adaptadajn kvalitojn, kio ofte ebligas al ili superi kontraŭepidemiajn barilojn. Nuntempe en la mondo nur oficiale registriĝas ĉiujare ĉirkaŭ 200 000 ĥoleraj malsanuloj, el kiuj mortas pli ol 4000 (ekzemple, en 2007 el 178 000 malsanuloj mortis 4031), do la meznombra morteco egalas al proksimume 2 %. Tamen en Afriko, kie registriĝas 90 % de la monda ĥolera malsaneco, en iuj landoj la morteco atingas 5 % kaj eĉ 10 %. La kaŭzo de tio estas la foresto de kvalita medicina helpo.

Estonteco de ĥolero

En landoj de Afriko, kie estas disvastiĝintaj ĥoleraj infekt-ardejoj, same en kelkaj aziaj landoj plej gravas radikale plibonigi la sanitaran situacion, provizi la loĝantojn per bonkva-



En 1883 Robert Koch evidentigis, ke la kaŭzo de ĥolero estas la bakterio *Vibrio cholerae*. La malkovro de Koch kontribuis al la klarigo de la vojoj de kontaĝo per la infekto. La ĉefa rolo en tio apartenas al infektita akvo. Ĥolero transdoniĝas ankaŭ per infektitaj nutraĵoj, manoj ktp. Muŝoj same aktive transportas la bakteriojn de ĥolero. Homo infektigas perbuŝe. Ĥoleraj mikroboj aktive reproduktiĝas en la maldika intesto, kie ili ellaboras venenon (ĥoleran toksinon). Ĝi kontribuas al eliminado de grandega kvanto de fluidaĵo el intestaj ĉeloj en la intestan kavon. En gravaj kazoj pro diareo la ĥolera malsanulo eligas dum unu tagnokto kun fekaĵo kaj vomaĵo ĝis 30 litrojn da likvaĵo, entenanta multajn milionojn da ĥoleraj bakterioj. Pro la forta senakviĝo densiĝas la sango,

perbuŝe (en facilaj kazoj) aŭ envejne (en gravaj kazoj). Ankaŭ estas akceptitaj antibiotikoj kaj aliaj medikamentoj. Ekzistas kontraŭĥoleraj vakcinoj, uzeblaj profilaktike laŭnecese.

Post la jaro 1926 ĥoleraj pandemioj preskaŭ malaperis, kaj la homaro trankviliĝis. Sed en 1961 neatendite komenciĝis nova tre vastega sepa ĥolera pandemio, kiu daŭras eĉ nuntempe, do jam dum pli ol 40 jaroj. Ĝi ricevis la nomon *El Tor*. Ĝia kaŭzanto estis vibrio iomete malsama ol la klasika vibrio malkovrita de Koch en 1883, nome la vibrio *cholerae El Tor*. La ĥolero El Tor havas iujn klinikajn kaj epidemiologiajn specifikaĵojn kompare kun klasika ĥolero: malpli ofte estas gravaj klinikaj simptomoj, la vibrioj El Tor kapablas longdaŭre resti vivaj kaj reproduktiĝi en akvoj ktp.

lita akvo, kontraŭmuŝaj aranĝoj, persona higieno, pli kvalita medicina helpo ktp. En Eŭropo kaj norda Ameriko, kie nuntempe la plej gravan rolon en apero de ĥoleraj malsanuloj ludas enportado de la infekto el endemiaj regionoj rezulte de turismo, interlanda komerco, pilgrimado ktp, plej gravas en preventado de ĥolero la konstanta kontrolado pri ĉiuj migradaj procesoj, precipe el endemiaj regionoj. Do, nuntempe ĥolero ankoraŭ ne povas esti plene likvidita, interalie ĉar en la mondo pli ol unu miliardo da loĝantoj ne havas puran, sendanĝeran akvon. Sed en la monda socio, la riĉaj landoj devas ekkonscii, ke nia mondo estas unueca kaj sen tutmonda interhelpo, ĥolero, tiu tre antikva danĝera malsano, ankaŭ hodiaŭ prezentas minacon por la tuta homaro.

Vladimir LEMELEV

Geja paro en Malavio

En majo 2010 subite fariĝis tutmonda novaĵo: geja paro en Malavio, Steven Monjeza (26-jara) kaj Tiwonge Chimbalanga (20-jara), en decembro 2009 sciigis, ke ili intencas nupti. Sammonate ili estis arestitaj, kaj komence de majo sekvis la verdikto: 14 jarojn en karcero. La juĝisto klare aldonis, ke estas lia devo ŝirmi la socion kontraŭ tiaj ŝokaj ekzemploj de obsceneco kaj tiu kontraŭnatura agado. En multaj landoj en Afriko samseksemo estas leĝe malpermesita.

Sekvis internacie malsamaj reagoj: unuflanke aprobo flanke de tradiciaj ekleziaj instancoj, aliflanke protestoj de organizaĵoj, kiuj protektas la homajn rajtojn. Ankaŭ pluraj registaroj, precipe de landoj, kiuj finance subtenas Malavion, akre protestis kaj eĉ minacis forpreni la evoluhelpan subtenon. Ministro Verhagen el Nederlando alvokis Eŭropan Union postuli de Malavio ŝanĝi la koncernajn kontraŭ-gejajn leĝojn. Ankaŭ la sud-afrika prezidanto Zuma, kies lando en 2006 rekonis gejajn nuptojn, protestis. Je plej alta politika nivelo aktivis Ban Ki-moon, ĝenerala sekretario de UN. Post lia interveno la prezidanto de Malavio liberigis la paron.

Mallonge poste sekvis informo, ke Steven Monjeza forlasis sian partneron kaj nun intencas edziĝi al 24-jarolino, Dorothy. Pluraj supozas, ke la parencoj tion organizis.

Reĝino Viktoria

Reĝino Viktoria estas simbolo de tuta epoko: dum ŝia longega regado kiel reĝino de Britio (1837-1901) kaj imperiestrino de Hindio (1877-1901) iom post iom Eŭropo kaj grandparte eĉ la tuta mondo komencis sekvi kutimojn,



Ministro Verhagen el Nederlando alvokis Eŭropan Union postuli de Malavio ŝanĝi la koncernajn kontraŭ-gejajn leĝojn.

morojn kaj idealojn de la Brita Imperio. Kaj konkrete por la nuna temo tio ankaŭ implicas la koncernan seksan moralon: unuflanke al la viroj oni permesis, kondiĉe ke tio ne tro klare montriĝu, certan seksan liberecon eĉ vizitado de bordeloj, aliflanke certe al la virinoj oni ne multe lasis da libereco. Samseksemo laŭ ekstera aspekto socie „ne ekzistis”: se ie tamen ĝi atingis ĝeneralan atenton, sekvis skandalo. La skandalo ĉirkaŭ Oscar Wilde estas fama ekzemplo de tio.

Por mallongigi la historion: ĉie tra la Brita Imperio – kaj, kiom mi scias, ankaŭ en pluraj aliaj koloniaj imperioj – oni enkondukis leĝojn konforme al la tiama pruda brita konvinkigo: specife samseksemo estis leĝe malpermesita, kaj ofte minacata per gravaj punoj.

Danĝera heredaĵo

La dua duono de 19^a pasinta jarcento ĉie tra la mondo vidis memstariĝi eksajn koloniojn de la eŭropaj potencoj, sed bedaŭrinde en multaj el ili postrestas ankoraŭ kiel timiga heredaĵo el Eŭropo la kontraŭgejaj leĝoj. Samtempe plurloke kreskis precipe la plej tradiciemaj

kristanaj movadoj kaj eklezioj, interalie en Afriko. Kaj ĝuste tiuj eĉ plifortigis la miaopinie obsedan timon pri samseksemo: en la biblio ja estas la fama rakonto pri Sodomo (Genezo 18-19). Sed ĉe atenta legado oni konstato, ke ĝi ĉefe temas pri ksenofobio (timo de, kaj malamo kontraŭ fremduloj). Nur posta (mis)ekzegezo kondukis al emfazo pri gejeco. En la biblio ekzistas, tamen, klara ekspliko pri tio, kio estas la *peko de Sodomo*: „Jen kio estis la kulpo de via (tio estas de Jerusalemo) fratino Sodomo: malmolesteco, trosatiĝo per manĝado, kaj senzorgeco, kiun havis ŝi kaj ŝiaj filinoj; kaj la manon de malriĉulo kaj senhavulo ŝi ne subtenis. Kaj ili fieriĝis kaj faris abomenindaĵojn antaŭ Mi (t.e. Dio), kaj Mi forpuŝis ilin, kiam Mi tion vidis.” (Jeĥezkel 16:49-50) Tio do signifas, ke la ĉefa peko estis: ia sinadorado, malzorgado pri bezonuloj kaj similaj – simple dirite: pli-malpli tio, kio karakterizas nian „civilizitan mondon” kontraŭ fremduloj kaj malriĉaj landoj. Do kontraŭgejeco, miaopinie, nepre estas kontraŭbiblia, certe ne konforma al homaj rajtoj, sekve abolinda.

Intertempe en multaj eŭropaj landoj la sinteno al samseksemo funde ŝanĝiĝis. Ankaŭ pluraj eklezioj adaptis siajn juĝojn pri la temo. Pluraj eklezioj eĉ oficialigis gejajn nuptojn – tiu de la remonstrantoj kiel unua en Eŭropo – kaj ankaŭ en pluraj ŝtatoj gejaj rilatoj fariĝis oficiale agnoskataj. Sed bedaŭrinde en multaj eksaj kolonioj postrestas kontraŭgejaj leĝoj kiel timiga heredaĵo de 19^a kolonia epoko. Fariĝas tempo, ke oni tutmonde ekkonsciĝu, ke ne havas sencon nei tian fundan flankon de la homa ekzistado. Oni ne nur por sia plezuro ŝajnigas sin geja. Tia oni kutime naskiĝas!

Gerrit BERVELING

Fajra Kristnasko

Pereo de la preĝejo ĉiam estas ĉagrena afero por eklezia komunumo. Antaŭ Kristnasko litovojn ŝokis informo, ke dum profunda nokto, la 21an de decembro, subite, supozeble pro difekto en elektroinstalaĵo, ekflamis ligna preĝejo de la litova urbeto Labanoras. La preĝejo de la Naskiĝo de la Sankta Virgulino Maria brulis totale. Fajroestingistoj sukcesis savi nur la apude starantan lignan sonorilejon.

La unua preĝejo de la Naskiĝo de l'Sankta Virgulino Maria menciigās en 1522. Ankaŭ ĝi pereis pro incendio. Tamen oni strebis al rekonstruo de la sanktejo. Per kolektita mono ĝi reaperis en 1820. Onidire la preĝejo estis rekonstruita en mirakla loko. Unu fruan matenon sur la monteto homoj trovis per mirakla povo translokitajn lignajn trabojn destinitajn por la konstruo kaj bildon de Sankta Maria pendigitan sur alta stango. Ekde tiam la 8an de septembro en Labanoras oni festas la naskiĝtagon de la Sankta Virgulino Maria.

La sanktejo entenis 17 artajn valoraĵojn – bildojn „Maria”, „Sidanta Kristo”, portretojn de la 12 apostoloj, ankaŭ valorajn orgenon, kandeligojn. Ankaŭ la artaĵoj pereis en la fajro.

La eklezio kaj la tuta socio multe bedaŭris la okazintaĵon. Loĝantoj de Labanoras, kiuj perdis la propran preĝejon, komencis kolekti monrimedojn por rekonstruado de la sanktejo. Oni intencas komenci la laborojn printempe.

LAST

Tiel la preĝejo de Labanoras aspektis antaŭ Kristnasko ... kaj tiel ĝi aspektas nun. La fajro ne atakis la sonorilejon



Kumamoto



HARADA TSUKURU



HARADA TSUKURU

Sur la insulo Kjuŝu, la plej suda el la kvar grandaj insuloj japanaj, kuŝas Kumamoto. La urbo estas fama pro sia kastelo, kiu estas unu el la plej vidindaj de la lando. La kastelo Kumamoto havas pli grandan areon ol la kasteloj Himeĝi kaj Osaka. Tre multaj turistoj vizitas ĝin. Multaj el ili venas el la proksime situanta Suda Koreio.

En 2008 la kastelo Kumamoto festis la 400-jaran jubileon de sia ekzisto. Fes-tante tiun jardatrevenon, oni inaŭguris novan konstruaĵon, nomatan Honmaru-goten. La vizitantoj flaras ĉi tie la bon-odoron de arboj kaj ekscias kiamaniere la kasteloj kaj aliaj konstruaĵoj ekestis. En la kastelo videblas tipe japanaj artaĵoj, iuj el oro.

Post eliro el la ĉefa kastelo la vojo kondukas al la granda ĝardeno Ninomaru. En ĝi printempe floras la tipe japana simbolfloro sakuro. Rigardante ĝin, japanoj ofte trinkas sakeon, sukron aŭ bie-

ron kaj gaje pasigas la periodon de ĝia florado.

Uzante tramon, oni facile povas veturi al la ĝardeno Suizenĝi. Ĝi estis konstruita por la feŭdestro de Hosokawa Tadatoŝi. Poste kelkaj feŭdestroj plibonigis kaj luksigis ĝin. Nun la ĝardeno estas turisma vidindaĵo. En ĝi estas tradicia domo de teceremonio, en kiu oni povas gustumi la tipe japanan verdan teon.

Proksime al la ĝardeno Suizenĝi troviĝas la lago Ezu kaj gubernia biblioteko. En ĉi-lasto oni povas ekkoni la vivon kaj verkaron de verkistoj el Kumamoto. El ili tre konata estas Natsume Soseki. Liaj verkoj famas en la tuta mondo kaj estas esperantigitaj. Li fakte venis al Kumamoto por instrui la anglan lingvon en la urba universitato. Lia vizaĝo aperis sur iama japana bankbiletoto de mil enoj. Ankaŭ Koizumi Yagumo estas tre konata verkisto kaj ankaŭ li estis



HARADA TSUKURU



HARADA TSUKURU



HARADA TSUKURU



HARADA TSUKURU

6



HARADA TSUKURU

8



HARADA TSUKURU

7

universitata instruanto. Lia domo, kiu troviĝas en la urbocentro malantaŭ tre granda magazeno, estas vidindaĵo.

La gastoj de Kumamoto povas viziti ankaŭ la vulkanon Aso. Ĝi situas ekster la urbo. La vulkano estas tre aktiva kaj iufoje terure erupcias. Normale oni tute ne povas rigardi la krateron de vulkano, sed en Aso tio eblas, se danĝera gaso ne venas direkte al la vizitantoj. Ĝi erupcias



HARADA TSUKURU

9

sur la monto Nakadake. Multaj eksterlandaj turistoj deziras viziti la vulkanon Aso. La aŭtoro (rete: uea.faro@nifty.com) pretas gvidi tien esperantistojn.

Esperanto

En la urbo loĝis famaj esperantistoj. Unu el ili estas Ito Saburo (kromnomo), lia vera nomo estas Miyazaki Iwao. Lia tombo estas en la urbo Yamaga en la gubernio Kumamoto. Li verkis libron „Zamenhof” en la japana, kiu ankoraŭ estas vendata. Ankaŭ Nakagaki Kojiro estas famekonata esperantisto. Li multe laboris por Japana Esperanto-Asocio (nun Japana Esperanto-Instituto). Lia tombo estas en vilaĝo Kosa.

Menciindas ankaŭ la verkisto Tokutomi Roka. Antaŭ du jaroj Kumamoto-Esperanto-Grupo eldonis memorlibron pri li. Tokutomi vojaĝis al Rusio kun sia edzino Aiko kaj tie renkontiĝis kun la fama rusa verkisto Leo Tolstoj. Foto de la renkontiĝo videblas en la domo de Tokutomi, kiu estas vizitinda.

La insulo Kjuŝu iomete malsimilas al la aliaj insuloj. En ĝi estas multaj historiaj faktoj kun tie loĝintaj ĉinoj, koreoj, nederlandanoj, portugaloj. Pro tio en la loka dialekto restis portugaliaj kaj nederlandaj vortoj. Vojaĝante en Brazilo, la aŭtoro povis aŭdi portugaliajn vortojn, kiuj estas uzataj en Kumamoto.

HARADA Tsukuru

- 1.-2. En 2008 la kastelo Kumamoto festis la 400-jaran jubileon de sia ekzisto.
3. Uzante tramon, oni facile povas veturi al la ĝardeno Suizenji.
4. En la kastelo Kumamoto videblas tipe japanaj artaĵoj, iuj el oro.
5. Nun la ĝardeno Suizenji estas turisma vidindaĵo. En ĝi estas tradicia domo de teceremonio, en kiu oni povas gustumi la tipe japanan verdan teon.
6. Natsume Soseki
7. La vulkano Aso estas tre aktiva kaj iufoje terure erupcias.
8. Niktereŭto.
9. Kikuĉikeikoku.

ITALIO

Maŭzoleo al reĝo Gentio

En la itala urbo Gubbio (regiono Umbrio) troviĝas modesta maŭzoleo omaĝe al la lasta ilira reĝo Gentio (latine *Gentius*), reganta de 181 ĝis 167 a.K. Ĝi estas vizitata de multaj albanoj, loĝantaj en Italio aŭ eksterlande, ĉar ili konsideras la antikvan Ilirion antaŭanto de la moderna Albanio. En la jaro 2004 la albanoj organizis grandan dekhoran kulturalan aranĝon apud la maŭzoleo.

Reĝo Gentio estis venigita al Iguvium (hodiaŭ Gubbio) kiel kaptito post la malvenko de Ilirio en la milito kontraŭ Romio (170-167 a.K.). Oni traktis lin digne. Li loĝis tie pliajn 20 jarojn. Reĝo Gentio malkovris la kurac-efikon de

genciano. Tial tiu planto portas lian nomon (science *Gentiana*).

Bardhyl SELIMI



La maŭzoleo omaĝe al la lasta ilira reĝo Gentio.



Alia vidindaĵo de la urbo Gubbio: antikva rimia teatro.

GENGISH

**Kontribuojn por
la rubriko Turismo
de Monato
kunlaborantoj sendu al
turismo@monato.net.**

SIMONE AND PINO BERETTONI

Priatenti la naturprotektion



Danubo fluas tra 14 landoj.

En Vieno renkontiĝis ministroj kaj altrangaj registaraj reprezentantoj de 14 landoj de la danuba baseno sub la kunordigo de Internacia Komisiono pri Protekto de Danubo. Enkadre de la renkontiĝo ili subskribis administran planon pri la sekvaj kvin jaroj. Ĝi antaŭvidas aktivajn, kiuj devus realiĝi ĝis 2015 por enigi Danubon kaj ties alfluantojn en bonan ekologian staton kaj atingi daŭripovan akvouzon en la baseno.

Post sep jaroj da preparlaboroj la plano esperigas, laŭ prijuĝo de Monda Natur-Fonduso (WWF) kaj aliaj naturprotektaj organizaĵoj, ke ĉi tiu grava eŭropa akvoarterio estos revivigita. Samtempe naturprotektantoj avertas pri pluaj konstruaj ekzemploj favore al ŝipveturado, kiuj minacas subfosi la jam starigitajn celojn. Krome ili postulas malpermeson de fosfatoj en la lavo-preparaĵoj por plibonigi la akvokvaliton.

Tamen, krom multaj el la planitaj konstruoj kun potenciale damaĝaj efikoj al la riversistemo kaj homo, ĝis nun oni

ne notis gravajn „servojn” al la naturo en la danuba administra plano. Ekzemple, en la projekto en la supra parto de Danubo inter Straubing kaj Vilshofen, plivastigo de la rivero per baraĵa akvoŝtupo kaj kanalo detruus la lastan libere fluantan danuban sektoron en Germanio, kun gravaj sekvoj por la biologia varieco kaj la akvoadministrado en la regiono. Planoj pri plivastigo de Danubo por plibonigo de la ŝipveturado minacas krome la trinkakvaj provizojn de Hungario. Infrastrukturaj projektoj en la malsupra Danubo povus tute malaperigi la forte minacatajn populaciojn de sturgo.

Pli ol 100 000 civitanoj el la landoj de la danuba baseno subskribis peticion pri ekologie harmoniaj ŝipvetur-projektoj. Reprezentantoj de naturprotektaj organizaĵoj transdonis ĝin al la ministroj de la danubaj landoj kaj alvokis ilin intensigi la klopodojn por vivkapabla Danubo.

La plano pri administrado de Danubo estas normo de la akvorilata direktivo de Eŭropa Unio por la atingo de bona ekologia stato de dolĉakvaj medioj. „La noveco de la danuba administra plano estas, ke ĝi konsideras ĉiujn naturmediajn sekvojn, kaj ties celoj havas pli vastan atingeblecon ol plibonigo de la akvokvalito, konstruo de novaj akvopurigaj instalaĵoj kaj informado pri la bona agrikultura praktiko”, diris Andreas Beckmann, direktoro de la Programo pri Danubo kaj Karpatoj de WWF.

La unuan fojon oni emfazis ne nur la grandan efikon de la akvo-infrastrukturaj aktivajoj sur la riveran sanon, sed ankaŭ la neceson priatenti la naturprotektion.

Evgeni GEORGIEV

Fosilia trovaĵo



OFICINA CIENCIA/IVA, PT

220 jarmilionojn antaŭ nia tempo kvar metrojn longa reptilio migris sur ŝlimo ĉe riverbordo proksime al la hodiaŭa urbo Bad Königshofen en norda Bavario. La peza besto postlasis piedsignojn pli ol dek centimetrojn profundajn, kiuj seke malmoliĝis en la suno. Iam poste sablo, kunportita de inundo, plenigis la sulkojn kaj en jarmiloj ŝtoniĝis, dum la ĉirkaŭanta ŝlimo polviĝis. Tiel konserviĝis piedsigno de tiu dinosaŭro. Laŭ la ŝtata geologo Roland Eichhorn [ajhhorn] la fosiliaĵo estas tute eksterordinara.

Sciencistoj rekonstruis la historion de tiu piedpremsigno kaj nun esperas, ke iam troveblos pliaj fosiliaĵoj, eble kompleta skeleto. Ne konatas, kion manĝis tiu mallong-fingra-mano-besto kun la scienca nomo „Brachychiroterium” (de la greka βραχυ / braĥi = mallonga; χεῖρ / ĥeir = mano)

La fosiliaĵo estis malkovrita hazarde okaze de kartografiaj laboroj en tiu regiono kaj estonte estos eksponata en muzeo.

Jomo IPFELKOFER



Pri homoj kaj lingvoj romanece

notinde malfortigis la familion kiel institucion.

En la nuna ordinargranda romano, Declerck – kies ampleksan romanon *Tarokoj kaj epokoj* (FEL, 2002) mi flanke sed forte rekomendas, rompante la murojn inter recenzoj en nia transmura lingvo – traktas la ĥemion de multjaraj familioj kaj la fizikon de tiuj, kiuj ekfamilios, en la perspektivo de okcidenteŭropa urba etnomikso. Tiun ĉi firme esperantisman romanon Declerck konstruas ĉirkaŭ la demando, ĉu apud la plezuro de la lingvolernado – kiel la amora – sidas embuske la perforto. Per la fadena ideo, ke la devigo lerni la anglan similas al la seksa trudado, kaj ke Esperanto povas roli kiel repensejo ne nur pri la lingvo, sed ankaŭ pri la amaj interkomprenoj kernaj en ĉiuj rilatoj, la romano rakonte interligas mediojn, kuntekstojn, generaciajn vidpunktojn kaj atentindajn figurojn.

La enromanigo de juna turkino, la traktado kun numeraloj turkaj, la eksplicado de hezitemo pri plena plonĝo en la okcidentkulturan naĝujon – ĉu ĉio

ĉi lanĉas dialogon interkulturan preter la ĝisnunaj provoj? Sendube, jes, se ĉi tie komenciĝas procezo, daŭranta kaj reprenota de aliaj voĉoj. Tiu ĉi romano ŝvebas apud la ĝenro de persona romano sen grandaj internaciaj temoj, kiun mencias Jouko Lindstedt (p. 58, en sia artikolo *Lingvo – rimedo aŭ resurso?*, *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, Rotterdam: UEA, 2010, 51-62). Kaj tamen la celo de Declerck estas kunplekti la personan elementon kun la internacia – kaj porti la aventuron al pli alta ŝtupo. Laŭ mi, li sukcesas eduki nian guston tien.


Probal DASGUPTA

Christian Declerck: *Spitaj – kiel hidrargo*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2008. 208 paĝoj kudre binditaj, ePub, Mobipocket kaj PDF. ISBN 978-90-77066-00-3.

Prezo ĉe FEL: Bindita versio: 19,99 EUR + afranko; elektronikaj versioj: 12,00 EUR.

Kris Long iam plendis, ke la esperanta beletro estas „tro lingva”. Ĉu tia makulo efektive malfaciligas la verkadon kaj aprezaĵon de ordinaraj esperantaj romanoj? Diverse opiniu pri tio diversaj legantoj; Declerck en tiu ĉi verko kaptas per la kornoj sian taŭron: li rezolute donas al ni romanon pri lingvoj.

La esperanta projekto – ekde la ambicio kapti la interŝtatajn pintojn ĝis la romanoj – temas, interalie, pri la bela sonĝo, ke „la popoloj faros en konsento / unu grandan rondon familian”. Tiu sonĝo igas demandi, kiel do la anoj de tia sonĝo antaŭeniru en mondo, kiu



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kapti en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librefo.

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 € + afranko.

Kaptu la feliĉon!

La libro *Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo?* naskiĝis el la samnoma rubriko de la revuo *Bazaro*, eldonata en Rumanio. La redaktoro de *Bazaro* (kaj kompilinto de la libro) Júlia Sigmond petis la legantojn de la gazeto respondi al ĉi tiu demando, kaj en la libro vi trovos 104 respondojn. Kelkaj el ili estas anonimaj aŭ subskribitaj nur per la persona nomo, sed ĝenerale videblas ankaŭ la familinomo kaj lando. Inter la aŭtoroj estas kelkaj famaj esperantistoj, sed la plimulton vi verŝajne ne konas. La lingvaĵo estas tiu de ĉiutaga vivo, facila kaj bone komprenebla.

La respondintoj jam profitis, ke ili povis rememori la plej feliĉajn momentojn de sia vivo, iom filozofi pri la feliĉo mem, pri valoroj de la homa vivo. Kaj kion ni povas promesi al la legantoj de la libro?

La legantoj ricevos aron da malgrandaj rakontoj, de kelkaj linioj ĝis kelkaj paĝoj. Kelkaj el la rakontoj estas veraj beletraĵoj, kaj oni povas legi tiujn historiojn kiel romanon kaj aldone esti certa, ke ĉio finiĝos feliĉe! Iuj aŭtoroj priskribas sian tutan vivon, aliaj rakontas pri emociplena aŭ streĉa momento, ekzemple, sendifekta savo el akcidento, neatendita helpo en ŝajne senelira situacio, partopreno en konkurso, kortuŝa festo.

Aliajn respondojn oni povas trakti kiel etajn filozofiajn eseojn. Homoj meditas pri fido, pacienco, kompreno, libero, ĝojo, bono, naturo, paco, interna kaj ekstera harmonio. Multaj konfesas, ke por vera feliĉo „necesas” problemoj kaj malfeliĉo; nur post suferoj oni povas senti sin vere feliĉa. Por multaj respondintoj feliĉo estas ligita kun religio kaj Dio. Multaj deziras feliĉon ne por si, sed

por proksimuloj.

La legantoj ankaŭ ricevos liston de „ordinaraj” feliĉaj eventoj de la homa vivo: sukcesaj ekzamenoj, enamiĝo, la unua amletero, promenoj kun la amato, geedziĝo, naskiĝo de gefiloj kaj nepoj, profesiaj atingoj. Uzu tiun aron, ne preteratentu tian eventon en via propra vivo! Aŭ eble vi klopodu mem efektivigi ion? Eble vi povas fieri, ke via feliĉa momento estas pli originala kaj neordinara? Ĉu realigo de iu revo?

Multaj respondantoj parolis pri Esperanto en sia vivo. Feliĉon donas la studado de la lingvo, korespond-amikoj (kiuj ofte poste iĝas realaj amikoj), instruado de Esperanto, diligentaj lernantoj, sukcesaj tradukoj, verkoj, prelegoj, Esperanto-aranĝoj.

Interesa estas ankaŭ la formo de la respondo. Necesas konfesi, ke la demando mem ne estas tre originala. Oni ofte demandas pri feliĉo politikistojn, artistojn kaj aliajn famulojn, ĉu ne? Kion elpensi, por ke la respondo estu neordinara, interesa kaj ... eventuale demonstreu elokventon?

Kelkloke en la libro troviĝas grafikaĵoj, sed, ĝenerale, ili ne estas ligitaj kun la teksto.

Do, tiu libro provizos vin per agrabla filozofia-priesperanta-beletra legaĵo. Feliĉan tempopasigon!

Anna kaj Mati PENTUS

Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo?
Kompilata de Júlia Sigmond. Eld. Editura Triade, 2008. 144 paĝoj gluitaj. ISBN 978-973-8313-71-2.

Prezo ĉe FEL: 9,89 eŭroj + afranko.



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

Du tre sukcesaj komikaj dramoj

Ni tre bone konas Cherpillod kiel esploriston kaj tre erudician lingviston; malpli bone ni konas lin kiel tradukiston. Nu, ĉi tiu eldonaĵo montras al ni, ke ankaŭ la tradukan arton li majstras.

„La laksigo de Bebo” estas drameto, tre taŭga por surscenejigo fare de membroj de loka Esperanto-grupo aŭ por prezento dum kongreso aŭ alia formala kunveno.

Enhave, la dramo prezentas al ni aferon multe tro familieran por ĉiu el ni: nome, ĉiutagan kverelon inter edzo kaj edzino. Kiel ĉiam en tia kverelo, ĉiaj

racio kaj logiko malaperas, dum ambaŭ kverelantoj penas venki en vort-batalo. Negrave, pri kio unue temis la kverelo, post kelka tempo tio estas plene forgesita (se, efektive, la pridiskutotaĵo eĉ estas menciita). Ĉi-okaze la diskuto-celo estas solvi pseŭdoproblemon: Bebo (efektive, sep-jara infano) *eble* suferas pro konstipo. Sed kiam tiu problemo estas menciita, jam delonge daŭris la kverelado. Kial? Nu, neniam oni povas trovi la kaŭzon de intergeedzaj kvereloj, kiu neeviteble estas tute alia ol ĉiu tempo prikverelata.

Cherpillod bonege tradukis la dra-

mon, tiel ke neniam la frazoj havas ne-normalan sonon. Estas preskaŭ, kvazaŭ ni aŭdus sonregistraĵon de vera hejma kverelo, tiom konvinke versimila estas la parolado.

Kiel pli varme rekomendi ĉi tian verkon?

Donald BROADRIBB

Georges Feydeau: *La laksigo de Bebo*. Tr. André Cherpillod. Eld. La Blanchetiere, Courgenard, 2010. 64 paĝoj gluitaj. ISBN 2-906134-86-4.

Prezo ĉe FEL: 6,36 eŭroj + afranko

La franca aŭtoro Jean-Baptiste Poquelin (1622-1673; pseŭdonomo: Molière) estas la plej bone konata kaj, verŝajne, la plej talenta dramisto en la historio de la franca teatro. Krom grandskalajn dramojn, li verkis ankaŭ komedietojn, el kiuj ĉi tiu estas inter la plej famaj.

Por ĉi tiu eldono, André Cherpillod prezentas sur alternaj paĝoj la francan tekston kaj la esperantan tradukon.

Temas pri drameto, kian povus facile surscenejigi loka klubo, por siaj membroj kaj gastoj, aŭ por kongreso, aŭ alia publika prezento. Cherpillod tradukis per tre flua, konversacieca lingvaĵo.

La intrigo estas simpla: maljunulo riĉa, nomata Sganarelo, enamiĝis al junulino nomata Dorimena. Sed li ne certas, ĉu tia geedziĝo estus bona afero. Li demandas diversajn personojn, por aŭdi ilian opinion pri tio.

Li demandas al du „filozofoj”, unu post la alia. Molière forte mokas ilin,

pro ilia sinpriokupo, kiu malebligas al ili, ke ili konsideru realan situacion, anstataŭ teoriumadon. La unua, Pankraco, pseŭdo-aristotelumadas, uzante amason da latinaj esprimoj, tiom, ke la aŭskultanto tute perdiĝas en la sensenca vortogalimatatio. La dua, Marfurio, rifuzas rekte esprimi opinion, tiel ke ne eblas konkludi, kia estas lia konsilo, nur ke li ne kapablas konsili.

Aliaj personoj ŝajnas diri, ke, ĉar la demando estas tiom subjektiva, nenia konsilo povus esti dirita.

Diskuto inter Sganarelo kaj Dorimena evidentigas, ke li kaj ŝi havas en sia menso nur la ideon, ke post la geedziĝo, li/ŝi povos pluvivi sian apartan vivon, sen atento al sia partnero.

Sganarelo ankaŭ subaŭskultas konversacion de Dorimena kun alia viro, per kio evidentas, ke ŝi ne amas Sganarelon, sed volas edziniĝi al li nur pro lia riĉo; ŝi ankaŭ supozas, ke Sganarelo ne longe vivos.

Sganarelo decidas nuligi sian proponon edziniĝi Dorimenan. Sed ŝia patro rifuzas permesi tion, kaj per truko la frato de Dorimena perforte devigas Sganarelon okazigi la geedziĝon.

Mia sola dubo pri nuntempa surscenejigo de la drameto estas, ke la spektantaro tiom konfuziĝus pro la arego da latinlingvaj frazoj de la filozofo Pankraco, ke oni ne volus resti por spekti la ceteron de la drameto.

Tamen, por la leganto, estas alie. Cherpillod aldonas multajn notojn, por klarigi la tekston, tiel ke la leganto povas plene ĝui la dramon kaj la tradukaĵon. Kaj tiu tradukaĵo estas vere bona.

Donald BROADRIBB

Molière: *Le mariage forcé/La truidita edziĝo*. Tr. André Cherpillod. Eld. La Blanchetiere, Courgenard, 2010. 64 paĝoj gluitaj. ISBN 2-906134-83-X.

Prezo ĉe FEL: 6,36 eŭroj + afranko

Vojaĝo unudirekta

Memoraĵoj de Orman Karg, astronauto

NOTO:

Kompreneble, mi ne povas laŭvorte ripeti la konversaciojn, kiuj okazis antaŭ la ekspedicio, sed mi provos rememori ilian esencon.

Kvankam mi emeritiĝis antaŭ pli ol dudek jaroj, mi ne perdis kontakton kun miaj antaŭaj kolegoj, nek kun la Kontinenta Spacinstanco, al kiu mi dediĉis grandegan parton de mia vivo kiel astrofizikisto. Kiel pensiulo mi ankoraŭ loĝas en la kvartalo, kiu kreskis ĉirkaŭ la tiel nomata kosmocentro. De temp' al tempo miaj antaŭaj dungintoj vokas min por doni konsilon pri teknikaj problemoj, kaj mi ofte tagmanĝas aŭ kafumas en la staba kantino de mia iama laborloko, kiam mi tediĝas de la televido aŭ de golfudado. Iutage, kiam mi estis en la kantino, mi renkontis mian junan najbaron Ilvit Hoarz, kiu nun okupas mian antaŭan postenon.

Mi demandis lin, kiel lastatempe progresas la esplorprogramo de la instanco.

Li rikanis. „Nuntempe ĝi iom stagnas. Ni sentas nin frustritaj.”

„Ĉu pro manko de fondusoj?” mi demandis.

„Ne – pro manko de imago kaj de iniciatemo. Nia tekniko apenaŭ disvolviĝis de post la tempo, kiam vi laboris ĉi tie. Ni bezonas novajn ideojn kaj pli da entuziasmo. La ĉefoj estas kontentaj, ke ĉiumonate ili ricevas siajn salajrojn. Ili ne multe interesiĝas pri rezultoj.”

„Kaj la Mars-projekto?”

„Oficiale ĝi estas la plej grava parto de la programo, sed aktuale ne multo okazas.”

„Ĉu vi opinias, ke oni rezignos pri la projekto?”


„Mi esperas, ke ne. Sed la granda tubero estas tio, ke, kvankam per nia ekzistanta tekniko, atingi la planedon ne prezentas problemojn, tute ne estas certe, ke ni povos revenigi astronautojn al la tero. Eĉ se ni sukcesos konstrui spacveturilon, kiu kapablos fari la dudirektan vojaĝon, ni dubas, ĉu la esplorteamo travivos. Plie, la disponeblaj fondusoj ne sufiĉas por konstrui veturilon sufiĉe grandan por transporti pli ol

unu personon. Prototipo de unupersona spacveturilo jam ekzistas, kaj la nova nuklea impuls-sistemo ŝajnas vere promesplena.”

„Do, oni devas rezigni pri la plano sendi esplorteamon, ĉu?”

„Ĝuste. Eĉ dupersona teamo ŝajnas neebla. Ĉiuokaze, oni dubas, ĉu du homoj ŝlositaj en malgranda kajuto dum almenaŭ 440 tagoj en ege malkomfortaj kaj danĝeraj kondiĉoj ne frenezigus unu la alian. Aliflanke, la streĉo kaj streso por unu sola kosmonaŭto fermita en kvazaŭa sardinskato dum tiom longa soleca vojaĝo povus esti netolerebla. Niaj psikologoj ankoraŭ ne havis okazon esplori ĉi tiujn aspektojn.”

„Tamen, oni havas sufiĉe da donitaĵoj



I AM HERE AND THERE

„Prototipo de unupersona spacveturilo jam ekzistas, kaj la nova nuklea impuls-sistemo ŝajnas vere promesplena.”

pri la efiko de longa restado en spaclaboratorioj en orbito ĉirkaŭ la tero, kaj ankaŭ sperton pri la diversaj vojaĝoj al la luno.”

„Efektive, sed ni ne scias, kio estos la efiko sur la homa psiko, kiam terano forlasas sian hejmplanedon, sciante, ke li eble malaperos por ĉiam en la dezerto de la interplaneda spaco. Mi supozas, ke iom similaj estis la sentoj de la ŝipanaro de Kristoforo Kolumbo, kiam ili vidis sian hejmlandon malaperanta sub la horizonton, sed por astronauto – precipe se li estas sola – tiaj sentoj kaj timoj devas esti eĉ pli teruraj.”

Iom da tempo post tiu konversacio en la kantino, mi ĉeestis oficialan ceremonion, kie mi hazarde renkontis la gvidanton de la Mars-projekto, kiun mi jam delonge konis. Li ŝajnis iom deprimita. Mi demandis, kiel li fartas.

„Mi fartas sufiĉe bone, sed ni ankoraŭ

baraktas kun grandaj problemoj pri la projekto. Tia vojaĝo estas tiom riska, ke ni hezitas sendi iun ajn al potenciala morto. Li estos elmetita al intensa suna radiado, ĉar efika plumba ŝildo kontraŭ ĝi estus multe tro peza por malgranda spacŝipo. Plie, provizo de sufiĉe da manĝo, akvo kaj oksigeno estos nefacila afero, eĉ por unu sola persono.”

„Sed tiuj problemoj estas solveblaj, ĉu ne?” mi demandis.

„Kiu scias? Tio estas kiel la antaŭspronoj de la kolosaj obstakloj, kiujn ni devas venki. Imagu, ke iu esploranto sur Marso volus grimpi sur la 26-kilometran Monton Olimpo, kiu, kiel vi scias, estas la plej alta monto en la suna sistemo. Tia defio estus simpla kompare kun la malfacileco, kiun ni alfrontas por atingi la planedon. Ni ne povas postuli – aŭ eĉ elekti volontulon – por tiu danĝeraga entrepreno.”

„Nur se volontulo elektus sin tute libere – homo sen edzino, sen dependaj familianoj, sen respondecoj, kiu jam ĝuis kontentigan vivon, kaj jam spertis ĉion, kion la surtera ekzisto povas proponi ...”

„Kie ni trovus tian volontulon? Ne inter niaj dungitoj.”

„Mi proponas min. Mi estas maljunulo, sed ankoraŭ relative forta, mense kaj korpe sana, inteligenta, trejnita, teknike sperta kaj psike ekvilibra. Mia edzino forpasis antaŭ longe; mi ne havas familion; kaj mi ĉiam ambiciis vojaĝi al Marso. Tio estus la kulmino de mia vivo, kaj al mi estas indiferente, ĉu mi revenus al la tero aŭ ne. Al mi ne restas multe da jaroj, kaj mi preferus uzi ilin por plenumi mian plej grandan deziron, nome treti la grundon de la Ruĝa Planedo. Ni ĉiuj devas morti, kaj al mi ne gravas, ĉu tio okazos sur la tero, ĉu sur



fora planedo. Sed estus granda krimo permesi, ke juna homo endanĝerigu sian vivon en tia riska entrepreno.”

* * *

Dum monatoj la estraro de la spac-centro diskutis mian proponon. La plimulto unue opiniis, ke mi estas tro maljuna por esti akceptita kiel astronauto, sed mia juna amiko Ilvit Hoarz sukcesis konvinki la kolegojn, ke ili devus almenaŭ konsideri min kiel kandidaton. Fakte, neniu alia volontulo aperis, pro la fakto, ke la projekto ŝajnis tiom malbone planita. Estis evidente, ke la ĉefoj ne certis: (1) ĉu ili posedas la necesan teknikon por atingi Marson, (2) ĉu ili kapablas revenigi la unupersonan spacveturilon al la tero post la projektata dumonata restado sur Marso. (Tiun restadon oni poste proponis redukti al unu monato.)

La estraro intervjuis min tuj post sia kunveno. Alvo Tomar prezidis. Li asertis, ke la instanco estas optimisma pri sia teknika kapablo sendi la spacveturilon al Marso, kaj restas memfida, ke revenvojaĝo eblas kaj certe efektiviĝos. Poste, tamen, dum privata konversacio, la direktoro esprimis dubon pri la reveno, kaj ankaŭ pri tiom longa restado sur Marso.

„Vi jam scias, kiuj estas la plej gravaj defioj, kiujn iu ajn homo devas alfronti survoje al Marso kaj sur la surfaco de la planedo, nome: la fizikaj efikoj de elmeto al altenergiaz kosmaj radioj kaj alia joniganta radiado, de plidaŭrigita malaltgravita medio, kaj de malhel-luma medio. Mi supozas, ke vi ankaŭ kalkulis kun la psikaj efikoj de izolado, kaj de la manko de komuneco kaj kunuleco, pro la malesto de samtempa komunikado kun la tero. Plie, en kazo de malsano aŭ akcidento, tute mankos rimedoj medicinaj kaj kuracista prizorgo.

Dum la interplaneda vojaĝo la homo korpo certe perdos muskolan tonion, kaj la membroj certe iom atrofios, ĉar la eblo ekzerci sin en la limigita spaco de la kosma ŝipo estos ege limigita. Eble oni perdos – almenaŭ dumtempe –

la kapablon stari aŭ promeni.”

„Ĉion mi jam konsideris kaj akceptis. La tuta marsa medio estas malamika al la homaro. Tie ne troviĝas likva akvo, kvankam frostigita akvo ja ekzistas. La tiea termika inercio estas multe pli

pondeca por la nenecesa morto de iu ajn. Tamen, la prezidanto insistas, ke li volas meti homojn sur la surfaco de la planedo. Do, unue ni sendu ĝin al la centra kuracisto por korpa ekzameno, kaj poste vi diskutu la aferon kun la scienculoj kaj teknikistoj. Mi scias, ke pro via longa

**„Vi scias,” diris Holgan, „ke ĝi estas malgranda planedo.
Ĝia radiuso estas iom pli ol duono
de tiu de la tero. Ĝia pejzaĝo estas pli impona
ol io ajn sur nia planedo.
Eĉ la monto Everesto kaj la Granda Kanjono en Usono
ŝajnas sensignifaj kompare kun Olimpo
kaj la Valoj Marinerisaj sur Marso.**

malalta. Polvaj ŝtormoj estas oftaj kaj severaj, kaj oni ankoraŭ ne konstatis, ĉu niaj ekipaĵo kaj aparataro kapablas rezisti ilin, kaj ĉu la homa korpo – eĉ portante protektajn vestaĵojn – povos supervivi post tiaj ŝtormoj. Kompreneble, oni atendus, ke astronauto ne troviĝas ekstere en tiaj veteraj kondiĉoj.”

„Tion mi komprenas.”

„Plie,” daŭrigis Tomar, „oni devas pensi pri la temperaturo, aŭ pli ĝuste, la grandega temperaturo vario de Marso. Ĝi varias de proksimume -143 °C dumvintre ĉe la polusoj ĝis plej alta somera temperaturo de 20 °C dumsomere. La homa korpo apenaŭ povas adaptiĝi al tiaj ekstremaj ŝanĝoj ...”

„Kio pri la eskimoj?”

„Ni ne estas eskimoj. Ĉiaokaze, eĉ eskimoj neniam suferas tiom malaltan temperaturon kiel minus 143 °C. Se mi ĝuste rememoras, la plej malalta tera temperaturo iam registrita estas de -89,2 °C. Tio okazis ĉe Vostok en Antarkto.”

„Mi havas la impreson,” mi komentis, „ke vi volas malinstigi homan ekspedicion al Marso. Kiel multaj aliaj el miaj kolegoj, ni preferus intertempe sendi robotajn esplorilojn anstataŭ homaj astronautoj. Mi ne deziras esti res-

sperto ĉi tie vi estas verŝajne la plej teknike kapabla persono en la centro, sed estas kelkaj novaĵoj, kiujn vi verŝajne ankoraŭ ne konas.”

La medicina ekzameno okazis senprobleme, kaj la ĉefscienculo Margan Holgan pli pridiskutis kun mi la kondiĉojn sur Marso kaj la celojn de la ekspedicio.

„Vi scias,” diris Holgan, „ke ĝi estas malgranda planedo. Ĝia radiuso estas iom pli ol duono de tiu de la tero. Ĝia pejzaĝo estas pli impona ol io ajn sur nia planedo. Eĉ la monto Everesto kaj la Granda Kanjono en Usono ŝajnas sensignifaj kompare kun Olimpo kaj la Valoj Marinerisaj sur Marso. La monto Olimpo estas trioble pli granda ol Everesto. La valoj, kies bildojn vi jam vidis sur ekrano, konsistigas grandegan fendon en la marsa krusto. Ĝi longas 600 kilometrojn, kaj ĝia profundeco atingas sep kilometrojn.” Mi interrompis por diri: „Mi ofte pensis, ke eble restas en la fundo de la valo restaĵo de la plej densa atmosfero, kiun iam havis Marso – eble ankaŭ de akvo.”

„Tre malverŝajne. Tamen, oni povas nur konjekti pri tio, kion oni trovos ĉe la fundo. La kosmoŝipo kunportos unuhoman motorĉareton, kiu ebligas surfacan

esploradon. Plie ĝi enhavos multajn instrumentojn por serĉi eblajn signojn de ekzistanta aŭ estingiĝinta vivo, interesajn mineralojn, kaŝitajn akvoŝakojn, virusojn, kaj tiel plu. Pro la persona ĉeesto de astronauto oni povos plenumi komplikajn taskojn, kiujn robota esploro ne kapablas fari. Kompreneble, oni esperas, ke en fora estonteco estos eble establi pli-malpli daŭran kolonion sur Marso.”

„Iuj usonanoj eĉ proponis, ke iam oni sukcesos transformi la planedon en tersimilan medion, kreante spireblan atmosferon el oksigeno ricevita de polusa akvo, kaj plantante kreskaĵojn rezistajn al la severaj kondiĉoj.”

„Tio estas nura sciencfikcio. Niaj ambicioj estas multe pli modestaj. Ne, la marsa medio estas malamika al la vivo. Ĝi estas sterila kaj toksa. Rigardu, sur nia tero estas regionoj – ekzemple en Antarkto – kie apenaŭ troviĝas iu ajn specio de vivo, kaj kie la homo ne povus longe supervivi. Marso estas eĉ pli malamika al la homaro. Tamen, tamen, ĝia defio estas nerezistebla, kaj la prezidanto firme decidis persisti en la plenumado de la ekspedicio. Pluraj ŝtatoj promesis apogi ĝin per mono kaj materialo – ne tiom per personaro aŭ tekniko.”

Finfine mi estis akceptita kiel sola astronauto de la marsa ekspedicio. La fakto, ke iu eblo revenigi min al la tero estis tre duba, tute ne malinstigis min. Vojaĝi al nia najbara planedo estus la kulmino de mia vivo, kaj morto tiom for de mia hejma tero ŝajnis al mi digna fino de mia ekzisto.

* * *

II

Ekstraktoj el la taglibro de Orman Karg, astronauto

Kion mi skribu pri la vojaĝo inter la tero kaj Marso. Ne multon ... Ne multe okazas dum la longa, monotona, teda transiro tra la spaco. Mi legas, dormas, rigardas la ĉirkaŭpasantajn stelojn, planedojn kaj la timige malgrandiĝantan teron, manĝas kaj trinkas sengustan

Finfine mi estis akceptita kiel sola astronauto de la marsa ekspedicio. La fakto, ke iu eblo revenigi min al la tero estis tre duba, tute ne malinstigis min.

manĝaĵoj kaj likvaĵojn el plastaj poŝoj (feliĉe, kun aldono de kelkaj legomoj kultivitaj en hidroporaj cisternoj kaj – malofte – kelkaj fiŝetoj kiuj naĝis en la samaj cisternoj). La spacveturilo kunportas kokidojn, kaj eble proksime al la fino de la vojaĝo, kelkaj jam estos kreskintaj sufiĉe por provizi min per buŝpleno da kokinaĵo. La legomoj kaj aliaj plantoj kreskantaj en la cisternoj kontribuas al purigado de la aero. La recikligita akvo ne estas bongusta, sed ĝi estas trinkebla. Prizorgo de la plantoj, kokidoj kaj fiŝetoj iom malpezigas la monotonon de la vojaĝo. La soleco ne ĝenas min pro la fakto, ke mi pasigis parton de mia infaneco ĉe lumturo sur malgranda insuleto, kie mia patro estis lumturgardisto. Fakte, mi ŝatas esti sola. Homamasoj kaj urboj ne estas tiom allogaj, ke mi domaĝu ilin. Dumvojaĝe, mia plej ŝatata legaĵo estas longa poemo: „La infana raso”, de skota poeto. Temas pri la situacio de la homaro en tempo kaj en la universo – grava temo por terano aŭ astronauto. Precipe plaĉas al mi la dekkvara ĉapitro, kiu komenciĝas: Ni pioniraj homoj de la spacoj, / Trovas neniun ŝlosilon. Nia atome / Pelita ŝipo sagas rapide / Tra l’ kosmovastoj ... La resto de la ĉapitro priskribas sentojn kaj pensojn, kiujn ankaŭ mi spertas en mia kosmoŝipo. Eĉ Marso estas menciita en la dudekkvara ĉapitro: Mortanta Marso / (kion signifas?) / atmosfer-maldenso / kiel la lasta laco / de kadukula menso. Mi nun estas malpacienca por atingi mian marsan celon ...

Unua tago sur la Ruĝa Planedo

NOTO: Mi decidis ne uzi terajn homojn kaj datojn, kiuj ne havas sencon

sur planedo, kies tago estas je 2,7 % pli longa ol la tera, kaj kies jaro enhavas 686 tagojn.

La almarsiĝo estis sufiĉe malglata, sed feliĉe nek la ŝipo nek mi suferis damaĝon. Plie la ŝipo restis staranta, kio estas granda avantaĝo. Se ĝi estus falinta, mi havus gravajn problemojn. Mi tuj surmetis mian spacvestaĵon kaj eliris por starigi la instrumentojn. Mi ne povas priskribi miajn sentojn, kiam miaj piedoj staris sur la marsa grundo, kaj mi rigardis la ĉirkaŭan pejzaĝon. Ĝi rememorigis min pri la ruĝa dezerto en la mezo de Aŭstralio, sed mankas ĝia blua ĉielo. Ĝi estas samtempe bela kaj terure minaca.

Sepa tago

Mia unua vido de la Monto Olimpo, la plej alta monto en nia sunsistemo. Ĝi estas nekredebla, timiga, imponega. Antaŭ ĝi, mi sentas min kiel insekto.

Dekkvara tago

La ĉareto bone funkcias. Hodiaŭ mi pliproksimiĝis al la distaj Valoj Marinieraj. Kompare kun tiu kolosa fendo, la Granda Kanjono en Usono estas eta. Malfeliĉe, mi falis kaj grave vundis la dekstran kruron.

Trideka tago

Mia kruro ne saniĝis. Feliĉe mi ne konstatis signon de gangreno, sed mi estas tre laca kaj malforta. La instrumentoj donas ege interesajn informojn, kiuj estas konstante dissendataj al la tero.

Centa tago

Mi scias nun, ke mi estas mortanta. Vere, ĉi tiu planedo estas malamika al la vivo. Mi estas tute elĉerpita, kaj tiuj estos verŝajne la lastaj vortoj, kiujn mi skrib...

NOTO ALDONITA DE ANOJ DE LA DUA EKSPEDICIO AL MARSO

La taglibron de Orman Karg ni trovis apud lia kadavro. La mieno sur lia vizaĝo aspektis trankvila kaj kontenta.

Garvan MAKAL

Ekslibriso

Dima revenis hejmen, kontenta pri sia nova libro, libro, kiu ŝanĝos lian vivon. Post formeto de siaj jako kaj ŝuoj, li tuj iris al sia laborĉambro, kiu simple odoris je libroj: novaj kaj malnovaj libroj vice kaj etaĝe tronis de la planko ĝis la plafono, pretaj por tuja konsulto aŭ tralego, sed plejparte senlaboraj.

Sur la ligna skribotablo apud la fenestro staris skribmaŝino kaj apud paperfaskoj ujo kun skribiloj. Aliflanke de la biblioteko, granda staranta pendolhorloĝo senlace indikis la tempon. La libroŝrankoj ie-tie estis ornamitaj per statueto, skatoleto aŭ simila objekto.

Dima eksidis en la leda fotelo kaj el tirkesto prenis skatoleton kun malgrandaj, sed belaj paperslipoj: centoj da identaj ekslibrisoj. Sur la slipoj staris lia denaska nomo Dima Perković en

bele ornamitaj literoj kun sub ĝi bildo de multkolora papilio, sidanta sur paĝo de malfermita libro. Tute sube troviĝis lia adreso en Zagrebo. Li zorge gluis la slipeton en la libron kaj refermis ĝin por meti sur faskon kun kelkaj aliaj libroj. El la sama tirkesto, li prenis kajejon, malfermis ĝin ĉe la paĝosigno kaj enskribis la plej gravajn datumojn de la nova libro: „Kie papilioj flugas” – aŭtoro – urbo – jaro – ISBN.

La libron li ne legos, ĉar li jam konas la enhavon. Anstataŭe, li kunportos la libron al sia propra butikoj: librobrotantejo en la centro de Zagrebo. Tie, li denove vendos la libron, prefere al iu turisto, sed kompreneble ankaŭ al iu ajn interesato. Dima estis 45-jara, mezstatura viro kun ĝentila mieno; ĉiam tre afabla, sed samtempe iom distanca kaj fermita. Liaj haroj havis la saman brunan koloron kiel

liaj okuloj. En sia librejo, li ĉiutage legis la ĵurnalon, foje murmurante komentojn, foje ridetante, sed kutime sufiĉe serioze kaj koncentrite. Poste li solvis la krucvortenigmon, ĝenerale kun malmulte da peno, fojfoje konsultante vortaron aŭ atlason de proksima breto.

La libro, kiun Dima tiun tagon kunportis, restis 4 semajnojn en la montrofenestro; fine li metis ĝin en la bretaron inter aliaj romanoj. Pasis monato, du monatoj, foje iu foliumis la verkon, remetis ĝin, prenis alian libron, revenis al la unua kaj tiel plu. Pasis preskaŭ jaro, dum kiu Dima aĉetis kaj vendis aliajn librojn, iujn kun ekslibriso, aliajn sen. Finfine iu virino tamen aĉetis la libron por legi dum sia vojaĝo, kune kun kelkaj aliaj libroj. Ŝi fakte loĝas en Germanio, eksciis Dima, sed ŝi havas parencojn apud Zagrebo, do ŝi profitas



La koncerna viro komplete legis la libron; parte dum vojaĝo, la ceteron li hejme tralegis.

de la okazo havigi al si legaĵojn en sia propra lingvo, ĉar malfacile akireblajn eksterlande. Dima bele pakis la librojn en tipe helbruna papero kaj ŝovis ĉion en platan sakon kun la adreso kaj emblemo de sia vendejo.

hejmlandon kaj kiujn aliaj ofte ne povas kompreni. Dum unu el siaj vizitoj, li donacis al ŝi la libron, kiun li aĉetis en Germanio, ĉar li sciis, ke ĝi plaĉos al ŝi. Kaj efektive: Mila tuj ŝategis ĝin, ĉar temis pri papilioj – nu, almenaŭ la

pri vi, Mila, kaj nia unusola kiso. En la bunkroj en la mallumo, vi estis tie, kaj ankaŭ poste, ĉiam kiam mi vidis papilion, mi pensis pri vi!”

„Post la milito, mi provis trovi vin, mi multe serĉis ĉiufoje, kiam mi estis en Kroatio, sed neniu en la vilaĝo sciis, kien vi iris.”

„Jes, ankaŭ mi. Mi ne sciis, kien vi iris, kaj plie, mi estis sendita al alia familio, kiu adoptis min kaj ankaŭ ŝanĝis mian nomon.”

„Ha, tial mi ne trovis vin en la telefonlibro de Zagrebo!”

„Jes, kaj tial mi komencis fari ekslibrisojn kun mia vera nomo, kun papilio en la desegno, kiu reprezentu vin, kaj libro por mi. Mi aĉetadis librojn pri papilioj, engluis ekslibrison kaj denove vendis ilin, foje postlasis en trajno, eksterlande kaj tiel plu ... en la espero, ke ĝi atingos vin. Mi scias, ke estas tre idealisme kaj eble naive, sed tamen.”

„Ho Dima, sed kiel vi sukcesis daŭrigi tiel longe?”

„Ha, Mila, oni neniam forgesas sian unuan amon!”

„Ho, Dima, kara, kara Dima! Mi bedaŭras, pardonpetas, sed post kiam mi ne trovis vin – mi eĉ ne sciis, ĉu vi entute ankoraŭ vivas, kaj en tiu alia lando, kien oni portis min, kun ĝia tute alia vivmaniero, mi edziniĝis kaj havas infanon.”

„Pri tio ne zorgu, Mila. Mi estas sufiĉe matura por scii, ke tio povis okazi. Eĉ estis verŝajne. Mi ĝojegas, ke vi estas viva kaj feliĉa! La nescio por mi estis pli terura ol iu ajn novaĵo, kiom ajn malbona. Nun mi estas liberigita kaj povas daŭrigi mian vivon.”

Kiam je tagmezo la kanono de la turo Lotrščak pafis, kiel ĝi ĉiutage ekzakte je la 12a horo faras, Dima fermis sian vendejon kaj promenis kun Mila manon-en-mano al restoracieto por tagmanĝi, kiel unufoje ĉiujare ekde tiam. Post la forpaso de sia nederlanda edzo, Mila reiris al Kroatio kaj ekloĝis kun Dima. La lastajn jarojn de sia vivo ili tute agrable pasigis kune.

Lode VAN DE VELDE

**„Post la milito,
mi provis trovi vin, mi multe serĉis ĉiufoje,
kiam mi estis en Kroatio,
sed neniu en la vilaĝo sciis,
kien vi iris.”**

En la trajno hejmen tamen, la virino endormiĝis legante la libron – ne ĉar ĝi estis malinteresa, sed pro la ritma ĉukĉuk-sono de la lokomotivo, la kdengkdeng-bruo de la radoj sur la reloj kaj la komforta seĝo en trankvila kupeo. Kiam la trajno alvenis en Frankfurto, kie ŝi devis ŝanĝi, ŝi ŝoke vekiĝis, rapide prenis siajn jakon, mansakon kaj valizon kaj hastis eksteren ... sen la libro. La trajno rapide poste pluveturis, kun la libro ankoraŭ en la dorspoŝo de la seĝo antaŭ ŝi. Foje iuj pasaĝeroj rigardis ĝin, iu eĉ trafolumis ĝin, sed sen interesiĝo pro la „stranga lingvaĵo” kun ĝiaj strangaj haĉekoj kaj akcentoj. En la trajnremizo, purigisto kunportis la libron por meti ĝin ĉe la aliaj forgesitaĵoj. Neniu venis por peti ĝin, do oni portis ĝin kun aliaj libroj al proksima brokantejo por havi iom da kromenspezoj. Kaj tie ĝi denove atendis aĉetonton ... dum pluraj monatoj. Relative rapide ĉi-foje tamen, vojaĝanto prenis ĝin ... estis nur malmultaj kroataj libroj tie aĉeteblaj, kaj la vendisto konis siajn klientojn kaj atentigis ilin pri la nove alvenintaj libroj.

La koncerna viro komplete legis la libron; parte dum vojaĝo, la ceteron li hejme tralegis. Tiu ĉi viro, Vlado, loĝas apud Amsterdamo kaj havas amikinojn, ankaŭ de kroata deveno, kiun li foje vizitas. Estis por ambaŭ ĉiam ege agrable ne nur povi paroli en la denaska lingvo, sed ankaŭ pri aferoj, kiuj koncernas la

titolo enhavis la vorton, do ŝi estis jam tre pozitiva pri ĝi kaj kontenta. De ĉiam ŝi amas papiliojn kaj intertempe kolektis multajn objektojn en sia hejmo kun tiu motivo.

Ŝi gaje malfermis la libron kaj ne povis ne rimarki la belan gluaĵon en ĝi: ekslibriso kun papilio sidanta sur malferma libro ... kaj kiam ŝi legis la nomon super la bildo, ŝi preskaŭ svenis: Dima Perković. Dum 2-3 sekundoj ŝi ne spiris, kaj Vlado konfuzite ektimis pri ŝia sano. Tiam Mila larme ekrakontis al li pri sia amiko el junaĝo: „Ĵus antaŭ la milito ni estis najbaroj. Mi estis eble 15-jara knabino, kiu adoris sekvi papiliojn; Dima kutime sidis ekstere legante. Iun tagon ni kune sidis malantaŭe en la ĝardeno, babilante kiel ni ofte faris. Subite, sen ia signo, estiĝis silento, dum ni rigardis unu la alian, alproksimiĝis kaj donis mallongan kison. Ni longe restis tie, manon-en-mano ... sed tiun nokton eksplodis la milito, kaj mia familio fuĝis eksterlanden.”


Unu semajnon poste en Zagrebo.

„... mia patro estis forvokita por militservi, nia domo estis ruinigita, do ni loĝis ie en keloj, havis tre malmultajn manĝaĵojn kaj ĉiam la samajn, poste venis nutraĵpakaĵoj senditaj per usonaj aviadiloj, do ni manĝis el tio, sed panjo malsaniĝis, kaj mi devis iri al orfejo, kie mi poste aŭdis, ke nek panjo, nek paĉjo ĝisvivis. La tutan tempon, mi pensis

Kiom da ?

Formu kvarcifera nombro kun la literoj de la grizaj kvadratoj!
 Bonvolu sendi vian solvon ciferece antaŭ la unua de septembro
 al enigmoj@monato.net aŭ al Flandra Esperanto-Ligo,
 Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio.
 Sukceson!

vidu + malnova ora monero
 malsekigi surverŝante + mil miloj
 vermformaj pastaĵoj R + scienc-instrua parolo R
 okcidentazia lando R + milona tuno
 oblikva supraĵo R + leĝera komedio R
 barilo de lignaj stagnoj R + okkruraj bestetoj
 ne konforma al sociaj kutimoj R + longpieda migranta birdego
 gaja burleskulo R + metodan esploron opinian
 menuo en restoracio R + tendaroj
 arkitektura stilo itala R + spirgason
 planko kovranta al tutan kavon de la ŝipo R + oficialan ordonon
 iu monato R + parton de ŝranko
 aro da rajdsoldatoj R + ilo



JPVDD

R = radiko de la vorto

Solvo de la “bilda enigmo” (Monato 3/2010)

Vi ne kredus sed mi fakte intencis kiel rezulto VINAGRO sed bedaŭrinde pretervidis unu grizan kvadraton kaj tiam iu vorto VIN-ARO estiĝis de kio kelkaj saĝuloj ŝanĝis prave al RAVINO ĉar ne nepre estu sinsekvo. Sed “VINARO” mi ankaŭ akceptis kiel solvon kaj koncedu ARO DA VINO pli bone gustas ol VINAGRO!

Inter tiuj kiuj tamen provis solvi tiun bildenigmon tri da ricevas premion, nome Yves Eeckhout (Belgio), Carles Vila (Hispanio) kaj Russ Williams (Pollando). Gratulojn!

K	V	A	R	A	N	T	E	N	O
O	x	V	I	T	R	E	x	x	R
R	x	O	V	O	x	R	I	N	G
I	P	x	E	L	x	A	L	T	A
N	I	G	R	x	x	S	I	I	N
K	L	x	O	K	R	O	x	M	I
L	U	N	x	V	O	x	R	O	Z
I	L	U	Z	I	x	R	E	T	A
N	x	L	A	N	D	O	x	O	D
O	M	x	x	A	K	T	O	R	O

Proverba enigmo

Serĉu du kaŝitajn proverbojn respektive sur la unua horizontala linio kun daŭrigo sur la lasta vertikala linio kaj sur la unua vertikala linio kun daŭrigo sur la lasta horizontala linio.

Bonvolu sendi vian solvon antaŭ la unua de septembro al enigmoj@monato.net aŭ al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio.

Johano Balczer, Hungario

1	2	3	4	5	6	7		8	9	10	11	12	
13								14					
15					16	17	18			19			
20				21							22		
23			24		25					26		27	
28		29		30		31			32		33		34
		35						36					
37	38					39	40		41			42	
43					44			45				46	
47		48		49							50		
51			52		53					54			
55					56				57	58			
						59							

Horizontale:

1 unua kaŝita proverbo, 7 ludkarto, 13 ukazo, 14 altaro, 15 ra ra, 16 konsonantoj de lampeto, 19 malsama, 20 aŭtosimbolo de Tanzanio, 21 aparato por pecetigi grenojn R, 22 ŝafa hararo (anagrame), 23 landokodo de Francio, 25 resti senmove R, 27 unuo de elektra rezistanco R, 28 instruio, 31 femala sufikso, 32 konfuza, 35 grasa parto el lakto R, 36 vokaloj de anatemi, 37 mezurunuo de elektrostatika kapacito R, (inverse), 39 kvar romie, 41 tre peza mola metalo R, 43 korinklina, 44 dio ĉe mahometanoj, 46 nedifinita loko, 47 graso sub la ŝafa haŭto R, 49 glata brila surfaco bildiga R, 50 longa metala stango R, 51 alta konstruaĵo (inverse), 53 malnova nomo de Tajlando R, 55 malakcepta, 57 korpe produkti (inverse), 59 konjunkcio montrante alternativoj

Vertikale:

1 dua kaŝita proverbo, 2 angla reĝa virnomo R, 3 rekte starantaj haroj R, 4 komencanta, 5 landokodo de Litovio, 6. ekstremoj de sfero R, 8 kritikanta verko R, 9 landokodo de Pollando, 10 malgranda, 11 sekrecio de hepato, 12 maltrinkos, 17 transigi en difinitan lokon, 18 antaŭe pripensita R, 24 tolo en kinejo R, 26 tia, 28 deva R, 29 tri unuaj literoj de azia lando, 30 fabela estaĵo (inverse), 32 landkarto R, 33 demanda pronomo, 34 pastra mesvesto R, 39 asocio de internaciaj instruistoj (mallongigo), 40 sencela, 42 kolektita abelproduktaĵo R, 44 raŭksona (inverse), 45 likvaĵa, akvoza R, 48 speco de rano, 50 talaro, surtuto, 52 1000 kg-oj R, 54 aktora tasko R, 56 malparaj literoj de tezo (inverse), 58 iu litero

R = radiko de la vorto

anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzempler. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

La Origino de Specioj

Karolo Darvino



Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, La Origino de Specioj restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo
aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be

prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi aŭ PDF).